



中國報道

EL POPOLA

CINIO








Ruĝbekaj mevoj
travinrantaj en
Kunming

Foto de **LIU SIGONG**



INTER NI

“Ankaŭ pri aliaj landoj...”

Estas fakte mirinda la ideo starigi la sekcion “Inter Ni” en “El Popola Ĉinio”. Ĝi donas al ni, legantoj, la spacon kaj la kuraĝon por opinii, por sugesti kaj por konstrue kritiki, kiam kritikoj fariĝas necesaj. Sur tio fundamentita, mi prenas liberecon skribi al vi, opiniante pri la temo ĉiam trovebla en la plimulto de la artikoloj de vi verkitaj kaj publikigitaj:

Ŝajnas al mi, ke vi devus, de tempo al tempo, skribi kaj fotografi ankaŭ pri aliaj landoj, krom la via. Se vi verkus artikolojn pri geografio, kutimoj, turismaj lokoj, belkonstruaĵoj, historio, arto, folkloro, ekologiaj aferoj... unuvorte, pri la ĝenerala kulturo de aliaj landoj — mi kredas — tio estus treege interesa tiel por la ĉinaj legantoj, kiel por la aliaj de la tuta mondo.

Kiel fari tion? Facile! Sendu raportistojn kaj fotografistojn eksterlanden, al la interesaj lokoj... aŭ mendu artikolojn verkitajn de viaj eksterlandaj legantoj, pere de invitoj aŭ de konkursoj.

Elkore mi pensas ke tiu ideo multe riĉigus “El Popola Ĉinio” kaj multe kontentigus nin, legantojn.

L. LEMOS (Brazilo)

Nia leganto L. Lemos en Brazilo proponis al ni temon pri aliaj landoj. Similajn proponojn donis ankaŭ aliaj legantoj. La propono estas tre signifa kaj povas riĉigi nian revuon por kontentigi niajn legantojn. Por raporto pri aliaj landoj, ni instalas la rubrikon “Tra la Mondo”, kaj ni petas artikolojn kaj fotojn de niaj legantoj por la rubriko. Sed pro nemulteco de laborantoj kaj financa problemo, portempe ni ne povas sendi raportistojn kaj fotografistojn eksterlanden, tamen ni klopodos senlace por plibonigo de la rubriko.

Koran dankon al s-ano L. Lemos kaj aliaj amikoj pro ilia kunlaboro.

LA Red.

ENHAVO

- 14 Nova projekto de la ekonomia konstruado de Ĉinio
- 30 Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (II)
- 6 **De kie venas la vigleco de la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio?**
- 16 **Multevalora foto**
- 32 **Pacaj senditoj en Quanzhou (I)**
- 45 **POR VIA SANO:**
Ĉigong-terapio kontraŭ koronaria kormalsano
- 40 **ANTIKAJ ĈINAJ FILOZOFOJ:**
Leĝismo, artifikismo kaj potencismo
- 27 **ARTOJ DE ĈINIO:**
Skulptistino el stepo
- 43 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 24 "Gastoj" vintrantaj en Kunming
- 11 **VOJAGO EN TIBETO (VI):**
Flugo tra "tabua aero"
- 46 "Marfunda mondo" en Pekino
- 49 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**

Alloga "pendanta" domo

21 **MIRINDAJOJ DE ĈINIO:**

La unua kaligrafo pri ĉinaj klasikaĵoj

19 **AMUZOJ**

20 Bergeno indas la vojaĝon

38 **KURANTAJ AFEROJ**

18 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (4):**

Hajpin Li

44 **POR KOMENCANTOJ:**

Kiu estas ŝia patrino?

4 **INTER NI**

22 Libro de ĈEE en 1990

37 **ESP-NOVAĴOJ**

42 44 **KORESPONDI DEZIRAS**

2 Ruĝbekaj mevoj travintrantaj en Kunming

4 La Granda Muro en nokto

54 Interesa prezentado


SUR LA KOVRILO:

Virino en ruĝaj vestoj

Foto de CAI HAIFENG

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Kunming (p. 34)
2. Quanzhou (p. 32)
3. Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (p. 27)
4. Yan'an (p. 16)
5. Okcidenta Hunan (p. 49)



De kie venas la vigleco de la



La Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio en nokto Foto de SHAO HUA


Komputila regadejo de kontinua gipsomaŝino de internacia avangarda nivelo



Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio?

— Pri la laŭkontrakta produktado de la kompanio

Teksto de DA WEI Fotoj de HAI FENG



Zhou Guanwu, partikomitata sekretario de la kompanio

Foto de YANG GUODONG

Antaŭ forno



DE 1979, kiam la Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio de Pekino ekpraktikis la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado, la profito de la kompanio kreskis ĉiujare je 20% en 12 sinsekvaj jaroj. Ĝiaj profito kaj imposto donitaj al la ŝtato en 1990 atingis 1.499 miliardojn da juanoj, 3-oble pli multe ol tiu en 1978 kaj egale al la neta valoro de la tuta fiksa kapitalo antaŭ la praktiko de la respondeca sistemo. La produktokvanto de ŝtaloj kreskis de 1.177 milionoj da

tunoj en 1978 al 3.809 milionoj da tunoj en 1990. La nuna Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio kun 180 000 laboristoj havas 10 filiajn kompaniojn kaj 98 fabrikojn. Krom ŝtalo, la kompanio sin okupas ankaŭ pri aliaj industrioj.

Ĉinoj miras pri ĝia rapida disvolviĝo. Antaŭ nelonge mi vizitis la kompanion. La direktoro kaj laboristoj ĉiuj kun ĝojo diris al mi, ke estas la respondeca sistemo, kiu alportas al ĝi viglecon kaj grandan profiton.

SURBAZE DE PLIGRANDIGO DE "KUKO"

Aganta direktoro de la kompanio Luo Bingsheng diris al mi: "La ĉefa tasko de nia reformado estas ŝanĝi la sistemon de planizita ekonomio kun altgrada centralizismo, doni memstarecon al la entrepreno kaj havigi al la laboristoj la rajton mastri sian kompanion. En la unuaj jaroj post la ekpraktiko de la reformado ĉiu kontrakto pri respondeca produktado validis nur unu jaron, sed tiam niaj profitoj estis nerimarkindaj. Ekde 1981 ni alprenis la sistemon de tuta respondeco pri progresiva kresko de profito donita al la ŝtato, t.e., kun 270 milionoj da juanoj kiel la bazo, la profito ĉiujare donita al la ŝtato kreskas je 7.2%. Se la kompanio ne atingas la normon, ĝi ne havas monon por la salajro, kromsalajro, bonstatiga fonduso kaj kuracpago de laboristoj. Nur ĉe superplenumiĝo de la normo, la kompanio havas kapitalon, fariĝos pli vigla kaj la vivkondiĉoj de la laboristoj plibonigos.

"La plej grava karakterizaĵo de la respondeca sistemo kuŝas en tio, ke fiksiĝis la bazo de progresiva profito kaj progresiva procento. La entrepreno devas ĉiamaniere plenumi la normon kaj laŭeble superplenumi ĝin. Oni difinis, ke la periodo de laŭkontrakta entreprenado estu 15 jaroj, kio utilas por pluapasa disvolviĝo de la entrepreno.

"Kompreneble, por efektiviĝi la progresivan kreskon oni devas preni sur sin grandan riskon. En la unua jaro post la ekpraktiko de la

respondeca sistemo la enspezo de la kompanio estis malpli ol 30 milionoj da juanoj, tamen la laboristoj bone komprenis, ke por efektiviĝi la kontrakton la entrepreno devas senĉese peni por pliiĝi sian enspezon. La tuta kompanio ĉiamaniere malpliiĝis elspezon kaj pliiĝis enspezon. Rezulte de tio, nia kompanio rapide disvolviĝis."

"Kiel la kompanio traktas la interesojn de la ŝtato, entrepreno kaj laboristoj?" mi demandis.

toj de la distribuado."

En la 30 jaroj antaŭ 1979 la profito kaj imposto donitaj de la kompanio al la ŝtato konsistigis 98% de la realaj profito kaj imposto. Tiam la ŝtato ricevis de ĝi 3.246 miliardojn da juanoj, dum la kompanio ricevis de la ŝtato 2.072 miliardojn da juanoj kiel investon, kaj fakte de la kompanio la ŝtato ricevis netan enspezon de nur 1.557 miliardoj da juanoj. Sed en la 12 jaroj post 1979 estis denove difinitaj procentoj de distribuado por la



La dua afinaciejo de la kompanio

Foto de **WANG HONGJI**

Li respondis: "Tio estas kerna problemo de la respondeca sistemo por la kompanio. La vigleco de granda kompanio kondiĉas ĝustan traktadon de rajto kaj profito inter la ŝtato kaj entrepreno. Estas ĝusta politiko, ke la ŝtato modere pligrandigas la memstarecon de entrepreno kaj levas ĝian aktivecon por krei pli da profito. Prave diris niaj laboristoj, ke oni devas bazi sin sur pligrandigo de la 'kuko' por disvolvi produktadon kaj krei pli da profito. Ju pli granda estas la kuko, des pli granda la profito donata al partoprenan-

ŝtato kaj la kompanio. Kvankam la procento de la "kuko" por la ŝtato reduktiĝis supraĵe, tamen la absoluta enspezo de la ŝtato pligrandiĝis rimarkinde pro vigliĝo de la kompanio kaj pligrandiĝo de la "kuko". En la pasintaj 12 jaroj la ŝtato ricevis sume 9.58 miliardojn da juanoj de la kompanio, kun dekkalkulo de la fiksa kapitalo de 3.7 miliardoj da juanoj kreita de la kompanio per ĝia propra kapitalo.

Dank' al la respondeca sistemo, levigis la entuziasmo de la laboristoj kaj la reala profito kreskis ĉiujare je 20%, kio garantiis la daŭran

pliigon de la fonduso por teknika reformado, kolektiva bonstatego, salajro de la kompanio k.a. Aperis en la kompanio bona cirkulo de entreprenado, akumulado, reformado kaj disvolvado per si mem.

RESPONDECA SISTEMO KIEL MOVFORTO

Estro de la Unua Ŝtalejo Zhu Jiangong diris: "La Ĉefurba Feraŝtala Kompanio praktikas kompletan respondecan sistemon. El la

korda laboro de bazaj grupoj, kaj dank' al tio okazis ĝojiga ŝanĝo: leviĝis la administra responsemo de grupestro, intensiĝis la devokonscio de laboristoj kaj pli grandigis ilia diligenteco por lerni teknikajn sciojn. La grupo de rulpontaj elektroteknikistoj ŝanĝis sian kutimon ripari ekipaĵojn nur post ĝia difektiĝo, kaj oftigis kontroladon por forigi kaŝitan danĝeron. Kaj krome, oni plibonigis la ekipaĵojn, por ke ili funkcii pli bone. Tial la grupo estis honorita

toj ne plenumis siajn taskojn. Laŭ regulo la fabriko deprenis de ĝi 7.5% de la kromsalajro por tri monatoj.

"La racia efektivigo de la respondeca sistemo havigis al la laboristoj la koncepton: La normo, tekniko kaj nivelo de produktado ne havas maksimumon. Sekve de tio, la produktado senĉese disvolviĝas, kio akcelas la progreson de la tekniko kaj renovigon de la ekipaĵoj.

"La jara produktopovo de la oksigena metalurgia konvertoro, farita de la kompanio en la 60-aj jaroj, estis nur 600 000 tunoj. Dank' al praktiko de la respondeca sistemo, la produktado disvolviĝas jaro post jaro kaj la maksimuma jara produktokvanto de ŝtalo atingis 2.222 milionojn da tunoj. La koeficiento de aplikado de la konvertoroj, ilia aĝo kaj kvalito de ŝtalingotoj estas la plej avangardaj inter la samspecaj entreprenoj, iuj el ili estas avangardaj internacie."

POTENCO DE LA LAŬKONTRAKTA LABORO

Grupestroj kaj laboristoj de la laminatejo konkure konigis al mi siajn travivaĵojn en praktiko de la respondeca sistemo.

Grupestro Liang Jintu diris: "Antaŭ 20 jaroj mi komencis labori en la fabriko. Mi opinias, ke la nuna laŭkontrakta laboro estas tre utila por la produktado. Tiam laboristoj ne bone laboris kaj produktado stagnis, kaj la fabrikestro estis maltrankvila. Por altigi laborofikon li noktis en la fabriko, sed tio ne bone efikis. La afero nun fariĝis tute alia. Nun ĉiuj bone scias, ke ju pli da laboro, des pli da enspezo. Ĉiuj laboristoj diligente laboras kaj studas teknologion. Antaŭe oni bezonis pli ol 20 tagojn por prilabori ŝtalan cilindron, sed nun nur tri tagojn."

Mi informiĝis de alia laboristo Su Weiguo, ke la labordivido estas sufiĉe delikata kaj ĉiuj maŝinpecoj prizorgataj laŭ kontrakto. Ĉiuj laboras streĉe kaj zorgeme por la fabriko.




Luo Bingsheng, aganta ĝenerala direktoro de la kompanio, konigas sperton en laŭkontrakta entreprenado.

principo de kombino de respondeco, rajto kaj profito la kompanio taskas ekonomiajn normojn de la ŝtato al ĉiu fako kaj ĉiu laboristo laŭ kontrakta laborsistemo. En ĉiu laborejo de la fabriko laboras administranto pri kontrakto. Ĉiu fako faras periodan teston kaj en la kompanio formiĝis reto de administrantoj. Ĉiu bone scias siajn devojn kaj laborcelon kaj laboras pli serioze ol iam antaŭe.

"Por efektiviĝi la respondecan sistemon la kompanio alprenis serion da konkretaj metodoj. Ekzemple, ni aranĝis aktivadon por re-

per la titolo 'elstara grupo'. Por intensigi la devokonscion de laboristoj pri strikta plenumado de respondeca sistemo en laboro, ni kuraĝigas ilin en laborado por atingi la ekzamenajn normojn. Laŭ difino, ĉiuj funkciuloj inkl. de fabrikestro kaj laboristoj devas fari ĉiuf flankan memkontrolon laŭ la respondeca sistemo kaj trovi sian mankon. Surbaze de tio, ĉiu devas ellabori planon por plibonigi sian laboron. Por bone efektiviĝi la respondecan sistemon ni alprenis rimedon de premio kaj puno. En la pasinta jaro la laborejo de dolomi-



En afinaciejo

S-ro Fan Shenli, alia grupestro, diris, ke la enspezo de laboristo kreskas jaro post jaro kaj la regularo por distribuado kaj premiado estas kompleta. Kiam li komencis labori en la fabriko, lia monata enspezo estis pli ol 40 juanoj, sed nun ĉiumonate li enspezas 500 juanojn.

Laboristo Hu Zhigang diris, ke kvankam laboristoj estis mastroj de entrepreno antaŭe, tamen iliaj proponoj ofte estis ne atentitaj. Post ekpraktiko de la respondeca sistemo la laboristoj fariĝis veraj mastroj de entrepreno. Nun la gravaj decidoj de la kompanio estas diskutataj de laboristoj anticipe. La normoj kaj rimedoj de laŭkontrakta laboro estas ellaboritaj post diskuto de laboristoj mem. Ĉiuj laboroj estas interligitaj de la respondeca sistemo. ■



Ĉenlabora linio

Flugo tra “tabua aero”

Teksto kaj fotoj de LI QIANG



Sur Lhasa-flughaveno Foto de WANG ENPU

Flugo en “tabua aero”



Pasaĝeroj en kajuto



MI devis forlasi Lhasa kaj reveni hejmen. Mi intencis aŭte eltibetiĝi laŭ la Sichuan-Tibeta Ŝoseo. Sed la ŝoseo estis detruita de terkota fluo kaŭzita de pluvego, tial mi veturis per aviadilo. Tio tamen donis al mi ŝancon informiĝi pri la civila aviado en Tibeto.

La flughaveno troviĝas en Gonggar for de Lhasa je 100 km. Ĝi estas civila flughaveno, kiu distancas plej malproksime de la urba kvartalo en Ĉinio. La aŭto veturis okcidenten laŭ la rivero Yarlung Zangbo. Trairinte Quxu-pontegon, ĝi iris orienten laŭ la suda bordo de la rivero. Post du-hora veturado ni atingis la flughavenon. Tien mi venis unu tagon antaŭe. La vivkondiĉoj kaj instalaĵoj de la flughavena hotelo estis malpli bonaj ol tiuj en la urbo, sed ĝi estis pura. Servistino diris al mi, ke pliigis la gastoj posttagmeze, ĉar la pasaĝeroj plejparte veturas tien antaŭ unu tago. Se oni startas de Lhasa en la sama tago, oni devas mem havi veturilon kaj ellitiĝi frumatene, alie ili malfruiĝos.

S-ro Wang Xiaoming, oficisto de la Tibeta Civila Aviada Stacio, afable prezentis al mi la staton de la tibeta civila aviado. Li diris, ke sub la putra reĝimo de la malnova Tibeto malprosperis produkto kaj trafiko, tiam ne troviĝis ŝoseo por ne paroli pri aerveturado. En la 30-aj jaroj la Kuomintang-a Registaro ja intencis malfermi aerlinion super la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, kaj komisiis al la tiama Ĉina Aviada Kompanio la preparadon de aerlinio inter Chengdu, Kangding kaj Lhasa. Sed tio disŝaŭmiĝis pro altaj krutaj montoj kaj malbonaj veteroj. Somere de 1943, usonaj aviadistoj volis transflugi la Tibetan Altebenaĵon en plej serena tago, sed fine ili reveturis antaŭ la tegmento de la mondo. Tial la Tibeta Altebenaĵo estis rigardata kiel "tabua loko" por flugado.

Pace liberiĝis Tibeto en 1951. La Ŝoseoj Sichuan-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta samtempe ekfunkciis en 1954, tio multe bonigis la trafikon de Tibeto. Sed la ŝoseoj serpentumas inter la apikaj montoj, ili tre facile blokiĝas de terkotaj fluoj kaj lavangoj. Ĉio ĉi multe malhelpis la trafikon. La sola ŝosea transporto ne povis kontentigi la bezonon de tibeta disvolviĝo, kaj malfermi aerlinion al Lhasa fariĝis peza tasko de la junaj ĉinaj pilotoj.

Por akiri ekzaktajn topografiajn kaj meteajn materialojn surteraj laborantoj atingis la Qinghai-Tibetan Altebenaĵon kaj faris sufiĉan preparadon por provflugado, stariginte en malfacilegaj cirkonstancoj pli ol 10 meteajn, telekomunikajn staciojn ĉe la Qinghai-Tibeta kaj Sichuan-Tibeta Ŝoseoj. En majo de 1956, komenciĝis la provflugado tra la "tabua aero". La 26-an de majo, piloto Han Lin kaj lia aviadista grupo sukcese stiris aviadilon Il 12 de Yushu, Qinghai-provinco, al Lhasa kaj malfermis aerlinion super la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo de norde. La 29-an de majo, piloto de la Ĉina Civila

Aviado Pan Guoding kaj liaj kolegoj per aviadilo sukcese portis 10 pasaĝerojn de Guanghan, Sichuan-provinco, al Lhasa. De tiam la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo ne plu estas "tabua loko".

S-ro Wang donis al mi dokumenton pri la historio de la tibeta aviado, kie legiĝas:

"De la 8-a ĝis la 21-a de oktobro, 1956, la aviadista grupo de Pan Guoding provflugis de Guanghan, Sichuan-provinco, tra Lhasa, al Hindio kaj sukcese surteriĝis en hinda flughaveno.

"La 24-an de oktobro, 1956, hinda aviadilo Il 14 sukcese atingis Lhasa flugante laŭ la ĉina provfluga aerlinio.

"De la 15-a ĝis la 17-a de aprilo, 1960, oni sukcese provflugis per grandtipa sovetia aviadilo Il 18 en Tibeto.

"La 1-an de marto 1965, aviadilo Il 18 flugis de Pekino al Chengdu. Tie haltinte ĝi atingis Lhasa la 2-an kaj reveturis al Chengdu posttagmeze de la sama tago; kaj sekure revenis en Pekinon la 3-an. Jen la aerlinio de Pekino — Chengdu — Lhasa oficiale ekfunkciis.

"La 25-an de aŭgusto 1975, malfermiĝis la aerlinio de Lanzhou — Golmud — Lhasa.

"La 1-an de novembro, 1979, Boeing 707 sukcese provflugis kun pasaĝeroj."

S-ro Wang informis al mi ankaŭ, ke krom la enlanda flugado, ĉiusemajne flugas ankaŭ du internaci-liniaj aviadiloj de Pekino — Chengdu — Lhasa — Katmanduo de Nepalo.

Poste akompanate de s-ro Wang mi vizitis la atendejon kaj flughavenon. La Gonggara Flughaveno estis konstruita en 1966. Antaŭ tio la flughaveno de Lhasa sin trovis en Damxung sur la herbejo de norda Tibeto. Dank' al la bonaj naturaj kondiĉoj, Damxung estas taŭga por starigi flughavenon. La konstruado komenciĝis aprile de 1956 kaj post 4 monatoj aperis la flughaveno sur altebenaĵo de 4 w200 m. super la marnivelo. En 1965 oni ekkonstruis en Gonggar novan flughavenon en la loko de 3 540 m. super la marnivelo. En la sekvanta jaro, ekfunkciis la nova flughaveno kun kurejo 3 600 m longa.

Ĝuste kiam ni alvenis al la atendejo, alvenis ankaŭ la internaci-linia aviadilo, kies pasaĝeroj venis en la atendejon por esti kontrolataj de la dogano, dume aliaj pasaĝeroj estis eldomigitaj. La pasaĝeroj de la internaci-linia aviadilo plenigis la atendejon, kie oni sentis sin sufokita. Malagrablo legiĝis sur la vizaĝo de la fremduloj.

Vidinte tion, s-ro Wang kun amara rideto diris al mi: "Tro malgranda estas la atendejo." Efektive estas malgranda la atendejo kaj krome, la tieaj instalaĵoj estas simplaj. La atendejo distancas de la kurejo je pli ol 2 km., tial ne eblas funkcii transporta bendo. Tio multe malfaciligas al la pasaĝeroj, kiuj devas



Gonggar-flughaveno en rekonstruado

veturi per aŭto de la atendejo, mem portante valizojn. Tamen ĝuste sub tiel malfacilaj kondiĉoj la Tibeta Civila Aviado sekure transportis, en la pasintaj pli ol 20 jaroj, 1.5 milionojn da homoj kaj grandan kvanton da precizaj instrumentoj, grenoj, bonrasaj brutoj, medikamentoj, vakcinoj k.a.

Estas ĝojinde, ke komenciĝis la ekspansiiga konstruado de la flughaveno. Ĝi estas unu el la ĉefaj konstruoj en Tibeto. S-ro Wang sciigis min, ke la ŝtato investos 268 milionojn da juanoj por la konstruo. En la flughaveno mi vidis kurejon konstruitan paralelan kun la malnova. S-ro Wang diris al mi, ke la nova kurejo, 4 000 metrojn longa kaj 60 metrojn larĝa, estas la plej longa kurejo de Ĉinio. Tie povos surteriĝi aviadilo Boeing 747 kaj aliaj aerbusoj. Dank' al ĝi, multe altiĝos la kapablo de pasaĝera kaj vara transportado.

Montrante vastan spacon proksime de la kurejo, s-ro Wang informis al mi, ke tie oni konstruos atendejon de 10 000 kvadrataj metroj. La projekta desegno montras, ke ĝi estos domo kun fortaj tibetaj trajtoj. Ĝi ekipita per modernaj instalaĵoj povos enteni 600 homojn. Por kiel eble plej efike malpliigi la malfacilojn kaŭzitajn de manko de oksigeno, la ĉefaj instalaĵoj rilataj al la pasaĝeroj estos aranĝitaj en la teretaĝo, tial ili ne bezonos iri supren kaj malsupren. Laŭ la plano tie oni konstruos biletejon, centralon por 400 telefonoj, sistemojn de satelitoko-

munikado kaj radiogvidado. La nova kurejo estas konstruata glate. Ĝi estos transdonita al trafiko somere de 1991. La konstruado finkonstruiĝos en 1993. Tiam la civila aviado faros pli da kontribuoj al la disvolviĝo de Tibeto.

Post granda penado, mi sukcesis ekspedi miajn valizojn. Atendinte pli ol 2 horojn, finfine mi eniris en la kajuton de aviadilo Boeing 707, kiu malfruis je unu horo. En la aviadilo stevardinoj alportis trinkaĵojn kaj manĝaĵojn. Ilia rideto forigis mian malagrablaron pro longa atendo. Stevardino rakontis al mi jenan historion.

Iufoje 10 minutojn post leviĝo de la aviadilo iu gravedulino subite paliĝis, spiregante. Ŝi ne pliboniĝis post urĝa savo. Du vivojn minacis la Morto. La aviadilo flugis en la aero 10 000 m. alta. Ĝi estis atingonta Chengdu post 70 minutoj. Akirinte la konsenton de la surtera gvidanto, la piloto tuj reverturigis la aviadilon. Dank' al la urĝa savo, la malsanulino eldangiĝis. Je tio, pli ol 20 alilandanoj kaj pasaĝeroj de Hongkongo kaj Aomen filmis tiun emocion scenon.

Pensante tiun emocion okazaĵon, mi rigardis eksteren tra la fenestro. Tiam la aviadilo flugis alte super blankaj nuboj. El nuba maro radiis la neĝaj montpintoj, pli blankaj kaj pli brilaj ol la nuboj. Ili sciigis min, ke mi estas fluganta tra la pasinta "tabua aero"!

Nova projekto de la ekonomia konstruado de Ĉinio

LA Sepa Tutlanda Popola Kongreso, kiel la plej supera aŭtoritata organo de Ĉinio, okazigis sian kvaran sesion de la 25-a de marto ĝis la 9-a de aprilo en la Popola Halo en Pekino. En la kunveno, krom diskuti pri raportoj prezentitaj de la Ŝtata Konsilantaro kiel kutime, oni ankaŭ diskutis kaj aprobis la "raporton pri dekjara projekto de la nacia ekonomio kaj socia disvolvigo kaj pri la programo de la Oka Kvinjara Plano" faritan de ĉefministro Li Peng en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro, kio difinis ĉefan celon kaj fundamentan orientilon por la disvolvo de Ĉinio en la lasta jardeko de la kuranta jarcento.

De la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko ĝis la fino de la 80-aj jaroj la registaro sume plenumis sep kvinjarajn planojn en la ekonomia konstruado kaj socia disvolvigo. I.a. la sesa kaj sepa kvinjaraj planoj estis efektivitaj sub la reforma kaj pordmalferma politiko ellaborita de Deng Xiaoping. Dum la praktikado de la du kvinjaraj planoj oni faris serion da reformoj al la ĉina ekonomia sistemo. Agrikulturo transformiĝis de kolektiva laboro kaj kuna distribuado en familian laŭkontraktan laborsistemon kun la familio kiel distribua unuo. Industrio kaj komerco disvolviĝis de la ŝtata kaj kolektiva posedsistemoj en pluralisman posedsistemon de la ŝtato, kolektivo, individuo kaj ŝtate-private kunfunkciigataj entreprenoj. Kun la reformado de la ekonomia sistemo kaj perfektigo de la pordmalferma politiko, multe leviĝis la totala produktovaloron de industrio kaj agrikulturo de Ĉinio kaj la vivo de la popolo, kaj fundamente solviĝis la problemo de minimuma vivnivelo en la vasta kamparo.

Surbaze de tio la raporto de la Ŝtata Konsilantaro prezentis la projekton de disvolviĝo de ekonomio kaj socio de Ĉinio en la venonta jardeko. La ĉefa celo de la projekto estas: Surbaze de altigo de profito kaj plibonigo de ekonomia strukturo, la totala produktovaloron de la nacia ekonomio, laŭ konstanta kurzo, kvarobliĝu en la fino de la kuranta jarcento en la komparo kun tiu en 1980, la vivnivelo de la tuta popolo leviĝu de minimuma vivnivelo al bonhavo, por materiale fundamenti la disvolviĝon de la ekonomio kaj socio en la komenco de la venonta

jarcento.

La 3 000 reprezentantoj el diversaj lokoj de Ĉinio diskutis kaj ekzamenis la raporton de la Ŝtata Konsilantaro dum 15 tagoj. En la kunveno regis harmonia kaj varma atmosfero.

La reprezentantoj opiniis, ke estas realigebla la celo kvarobliĝi la totalan produktovaloron de Ĉinio je la fino de la kuranta jarcento. Ĉar la totala produktovaloron jam kreskis de 447 miliardoj da juanoj en 1980 al 1 740 miliardoj da juanoj en 1990, pliigis je 1.36-oblo kaj la jara meznombrata kresko estis 9%. Se la jara meznombrata kresko estos 6%, la celo certe realiĝos. Tamen ekzistas iuj problemoj en la nuna ekonomia sistemo por efektiviĝi la celon.

Nun, konsidere la tro rapidan ekonomian disvolviĝon, malekvilibron de la elcentoj de la ekonomia strukturo kaj la seriozan inflacion en la lastaj jaroj, la registaro elmetis la politikon de korekto, ordigo kaj profundigo de reformado. Dank' al tio la ekonomia stato plibonigis en certa grado, grandskala prezaltiĝo estis bremsita kaj la malordaj procentoj de la ekonomio reguliĝis iom post iom. Tamen iuj fundamentaj problemoj en la ekonomia kampo ankoraŭ

Popolaj reprezentantoj voĉas por la rezolucio.



ne tute solviĝis. Subvencio de la registaro al la necesajoj de la popola vivo kaj al iuj grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj ankoraŭ konsistigas 1/3 de la financa enspezo, kaj precipe la profito de la ŝtataj entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj estas malpli alta.


Pri tio iuj reprezentantoj el ekonomiaj entreprenoj eldiris sian originalan opinion. Ili opiniis, ke la ŝtataj entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj, kies kapitalo konsistigas 66.5% de la totala kapitalo de ĉiuj entreprenoj de la lando, estas ŝlosilo por disvolvo de la tuta socia ekonomio. Ili ne nur estas ĉefa fonto de la financa imposto por la ŝtato, sed ankaŭ koncernas la disvolviĝan nivelon de la nacia ekonomio en la venontaj dek jaroj. Tial vigligi grandajn kaj mezgrandajn entreprenojn estas la ĉefa tasko por profundigi la reformadon al la ekonomia sistemo. Por solvi tiun problemon estas necese reformi la nunan administran sistemon de la entrepreno, kiu unuigas la registaran kaj entreprenan administradon, por ke la entreprenoj iom post iom apartiĝu de la rekta rego de la registaro kaj fariĝu memfinancaj. Samtempe,

konsidere la trajtojn de la industria produktado oni devas iom post iom disvastigi la kontraktan laborsistemon praktikatan en la kamparo. La reprezentantoj montris ankaŭ, ke poste la ĉina industria produkt valoro devas kreski pere de teknika renovigo, raciigo de administrado, malaltigo de produktokosto kaj altigo de profito, sed ne pere de multigo de nombroj de entreprenoj kiel en la pasintaj dek jaroj.

Por krei bonan medion por ekonomia disvolviĝo en la venontaj dek jaroj, reprezentantoj prezentis proponojn pri perfektigo de demokratio kaj leĝa sistemo. Ili postulis, ke la popola kongreso ŝanĝu la fenomenon, ke ĝi nur ellaboras leĝojn, sed ne ekzamenas ilian efektivigon. Ili apelaciis al la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, ke tiu kiel eble plej baldaŭ ellaboru kontrolan leĝon por akceli la popolan kongreson en rekta kontrolado kaj interveno al la laboro de la registaro, garantiu ĝustan plenumon de diversaj regularoj kaj kontinuan disvolviĝon de la ekonomia konstruado.

La kunveno de la popola kongreso atestis, ke Ĉinio jam eniris en novan periodon de stabila politiko kaj plenforta ekonomia konstruado. ■

Ekonomia disvolviĝo en 1980—1990 de Ĉinio



Multe- valora foto

de GUO CHUNXIAO kaj FAN JINGFU



Mao Zedong (dekstre) kaj juna soldato Liu Changgui (meze)

TIU ĉi foto estas vidata en multaj fotoekspozicioj kaj muzeoj. Oni tre ŝatas ĝin, ke ĝi estas rara foto farita en signifplena tempo.

Estis printempo de 1939, la tria jaro post kiam la japanaj imperiistoj agesis Ĉinion. Prezidanto Mao Zedong gvidis la ĉinan popolon en la malfacilega rezistmilito en la revolucia sanktejo Yan'an. Foje Prezidanto Mao venis de sia loĝejo Yangjialing al la Kontraŭjapana Milita-Politika Universitato por fari prelegon. Kiam la aŭtomobilo de Mao Zedong estis baldaŭ atingonta la oficejon de la universitato, elpaŝis el la bonvenigantaro du junaj soldatoj. Prezidanto Mao elaŭtigis kaj tuj rimarkis ilin. Li klinis sin kaj demandis intime: "Kamaradetoj, kiel vi nomiĝas? Kiom vi aĝas?"

Malpli alta Liu Changgui res-

pondis: "Mi havas 14 jarojn. Li nomiĝas An Dingbao kaj aĝas 15 jarojn."

Prezidanto Mao Zedong demandis kun prizorgo: "Ĉu vi vizitis lernejon?" "Ne," hontis Liu Changgui. Prezidanto Mao skribis per fingro sur sia manplato "Mao Zedong" kaj instruis al ili strekon post streko. Post momento Prezidanto Mao demandis: "Ĉu vi ellernis?"

"Jes," ĥore respondis Liu Changgui kaj An Dongbao.

Prezidanto Mao kuragigis ilin: "Vi lernu diligente. Kiam ni venkos la japanajn agresantojn kaj liberigos la tutan landon, vi havos multe da laboroj."

Iu atentigis al Prezidanto Mao: "Estas tempo por la leciono."

Prezidanto Mao levis la kapon, ekridetis kaj grandpaŝe iris al la klasĉambro.

Liu Changgui naskiĝis en kamparana familio. En lia infaneco forpasis la patrino kaj li migradis kune kun la patro kaj frato. En aprilo de 1937 li aniĝis al la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en la aĝo de 12 jaroj. Ĉe la fino de 1938 li venis al Yan'an kaj laboris kiel servosoldato ĉe la oficejo de la universitato. La alia sur la foto estis An Dingbao, kuriero de la universitata oficejo. Li venis de Anhui-provinco, aniĝis al la armeo en 1937 kaj oferis sian vivon sur fronto en 1939.

En 1944 Liu Changgui venis al nordorienta Ĉinio kune kun la universitato. Li partoprenis en la kampanjoj por liberigo de Shenyang kaj Fushun. Post la liberigo de la tuta lando li aliĝis al la Ĉina Volontula Armeo por helpi Koreion en ĝia rezista batalo kontraŭ la usona agreso. En 1955 li malmobiliziĝis estante bataliona direktan-

to. Post nelonge li estis nomumita sekciestro en la trafika buroo de la gubernio Haicheng de Liaoning-provinco. Pli poste li laboris kiel estro de la sekcio de ekipaĵoj kaj movoforto kaj tiu de la sekcio de fundamenta konstruado de la silka fabriko de la gubernio. En 1962 li estis nomumita estro de la sekcio de la popola armado de la fabriko. Li laboris sur tiu posteno 23 jarojn ĝis emeritiĝo.

Iun tagon en printempo de 1962, militamiko de Liu Changgui vizitis la Ĉinan Militan Muzeon en Pekino kaj vidis la foton kun la teksto "Prezidanto Mao kaj junaj soldatoj". Li longe pririgardis la foton kaj asertis, ke la malpli alta el la du soldatetoj estas Liu Changgui. Li petis kopion de tiu foto kaj sendis ĝin al Liu Changgui.

La foto ekstazis Liu Changgui. "Ĉu ne estas tio, ke Prezidanto Mao instruis al mi kaj An Dingbao skribi?" Li faris delikatan kadron kaj pendigis la foton sur la fronta muro en la ĉambro.

En 1976 la tuta lando dolore funebris pro la forpaso de Prezidanto Mao. Liu Changgui dronis en profunda malĝojo. Por memori pri Prezidanto Mao la Popola Eldonejo eldonis fotoalbumon "Prezidanto Mao eterne vivos en nia koro", en kiu estas la foto "Prezidanto Mao kaj junaj soldatoj".

Shi Shaohua (maldekstre) kaj Liu Changgui (la dua de maldekstre) denove renkontiĝas post 47 jaroj.



Multaj ĵurnaloj publikigis la foton. La modesta Liu Changgui ne povis plu teni sin silenta. Li kaj liaj militamikoj en Pekino, Nankino kaj Anshan kune skribis peticion, ke ili plenumu sian lastan gardostaron por Prezidanto Mao.

Kiam la foto estis publikigita, oni ne anoncis la nomon de la fotinto, tial Liu Changgui ne sciis, kiu li estas. Li longe klopodis por serĉi la fotinton.

Meze de aprilo de 1986, kamarado Shi Shaohua, vicestro de la Novaĵ-agentejo Xinhua de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Fotista Asocio, venis al Dandong por fari lekcion. La 26-an de aprilo oni informis Liu, ke Shi Shaohua estas la aŭtoro de la foto. En neretenebla ekscitiĝo Liu Changgui, en akompano de la edzino, veturis al Dandong.

Posttagmeze de la 28-a de la monato, antaŭ la domo n-ro 15 de la Hotelo Dandong, apenaŭ Liu Changgui surpaŝis sur la peronon, renkonte al li paŝis altastatura maljunulo. Liu Changgui tuj rekonis en li la fotiston antaŭ 47 jaroj. Liu Changgui rapide alpaŝis, firme brakumis lin kaj diris ĝoje: "Mi ja estas unu el la du soldatetoj. Mi fine trovis vin!"

Shi Shaohua diris humure: "Definitive revidiĝas militamikoj!"

Liu Changgui pririgardis lin de

supre malsupren: "Vi neniam ŝanĝiĝis en la aspekto. Mi neniam forgesis vin, sed mi ne sciis vian nomon, tial nur nun mi sukcesis trovi vin."

Ili kune rememoris la neforge-seblan momenton en Yan'an.

Shi Shaohua diris: "Kiam mi faris por vi foton, mi aŭdis, ke Prezidanto Mao admonis vin 'Vi lernu diligente...'"

"Jes, jes, tiam mi estis 14-jara kaj An Dingbao 15-jara."

"Kaj mi 21-jara."

Shi Shaohua ĝoje sciigis lin: "Prezidanto Mao iam diris al mi, ke li plej ŝatas la du fotojn de mi faritajn. Unu estas 'Prezidanto Mao kaj junaj soldatoj', kaj la alia 'Prezidanto Mao en interparolado kun kamparanoj de norda Shaanxi-provinco'."

Sed kial la foto estis publikigita anonime dum la longa tempo antaŭ 1962?

Foje antaŭ militiro iu kamarado metis multe da negativoj en sakon kaj la sako estis portata de ĉevalo. Kiam la trupoj estis transirantaj la blokan linion de la malamikoj, la ĉevalo estis terurita de la malamika kanonado, kaj perdiĝis la sako. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, iuj ĵurnaloj republikigis la retrovitajn fotojn anonime. En 1962 la gazeto Ĉina Fotografio denove publikigis tiun foton. Leginte la gazeton, Prezidanto Mao tuj venigis Shi Shaohua kaj ĝoje diris al li: "Mi bone memoras, ke vi faris tiun foton. Tiam vi estis la unika fotisto en Yan'an, kaj ni ĉiuj ŝatas tiun ĉi foton."

En la hotelo oni petis ilin surskribi sur lia kopio de la foto, kaj Shi Shaohua skribis: "La foto estis farita printempe de 1939, en la Kontraŭjapana Milita-Politika Universitato, Shi Shaohua."

Liu Changgui skribis en neretenebla ekscitiĝo: "Memore al la revidiĝo kun kamarado Shi Shaohua en Dandong, la 28-an de aprilo 1986, Liu Changgui." ■


Hajpin Li

de CHEN YUAN

Mi ricevis Esperantan libron el Seulo. Sur ĝia titolpaĝo estas bone skribitaj ĉinaj ideografiaĵoj:

Al fraĉjo Chen Yuan por peti kritikon
Hajpin Li (Yi Chae Hyon)
 1990 06 22, Seulo

Antaŭ mi aperis figuro de juna korea esperantisto Hajpin Li. La afero estis antaŭ 55 jaroj. Tiam mi estis studento. Hajpin Li eble kune kun Elpin venis en Kantonon. Li loĝis en malmultekosta studenta pensiono sur Hui'ai-strato. Li ofte partoprenis en nia renkontiĝo de esperantistoj, kaj iafoje en nia studenta nacisava movado. Li estas pli juna ol Elpin. Mi pensis, ke mi estas iom pli aĝa ol li (la libro, kiun mi ricevis, diras ke li naskiĝis en 1917), sed fakte li estas pli aĝa ol mi je unu jaro. En 1935 li eklernis Esperanton. Li amikiĝis kun junuloj en nia Esp-kurso. Kvankam li sciis ankaŭ la ĉinan lingvon, tamen ni ĉiam interparolis Esperante. Li estis malkaŝema, kuraĝa kaj agema, karaktere malsama ol Elpin kun tristo de poeto. La foto en la libro montras, ke li maljuniĝis. Tamen li aspektas kiel antaŭe. Ankaŭ mi maljuniĝis. Mi ne scias, ĉu li povas rekoni min, rigardinte mian foton. Post kiam okazis en Ĉinio la Evento de la 7-a de julio 1937, en kiu la japanaj imperiistoj komencis grandskalan agreson al Ĉinio, li ŝajne ne plu partoprenis en nia aktivado. Mi memoras, ke tiam mankis lia figuro en la kampanjo de internacia Esperanta propagando. De tiam ne venis al mi informo pri li. Post la milito mi pensis, ke li revenis al sia patrolando kune kun Elpin. La landlimo apartigis nin. Hazarde, dum la 66-a UK en Brazilio korea esperantisto transdonis al mi lian leteron kaj "Esperanto-Korea Vortaro" (1969) kompilitan de li. Kiel li sciis, ke mi estas kongresano? Ĉar mi devis prelegi en la Internacia Kongresa Universitato kaj mia foto kaj la kompendio de mia prelego estis presitaj en la kongresa libro. Certe li legis la libron. Venis ne li mem, sed lia unua letero post nia disigo antaŭ 40 jaroj. En la letero li menciis malnovajn amikojn. Estas interese, ke li demandis min, ĉu la bela knabino, kiu siatempe viglis kune kun mi en la Esperanto-movado, nun ankoraŭ estas kune kun mi? Mi respondis, ke jes. Dum dekoj da jaroj ni ĉiam vivas kune. Ŝi estas Yu Di (edzino de



Sur la titolpaĝo legiĝas ĉinaj ideografiaĵoj skribitaj de Hajpin Li.

la aŭtoro — *La trad.*), kiu instruis Esperantan kanton en la kurso. Mi diris al li, ke ŝi kiel antaŭe havas profundan senton por la verda stelo.

Iam post la milito Hajpin Li estis prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio. En tiuj jaroj lia plej granda kontribuo al la tiea Esperanto-movado eble estas tio, ke li kompilis du vortarojn — Esperanto-Korea Vortaro eldonita en julio 1969 kaj Korea-Esperanta Vortaro eldonita en februaro 1983. Lia libro, kiel antologio, kiun oni transdonis al mi, estis longe dezirata de li kaj de mi. Ĝi estas titolita "Koreaj Eseoj, Noveloj kaj Popolrakontoj (1932-1967)". Plej interesas min lia antaŭparolo kaj liaj 6 originalaj eseoj. La unuaj alineoj de lia antaŭparolo legiĝas kiel jene:

"Estis mia longa deziro vidi la aperon de Korea Antologio. Mi ankoraŭ deziras vidi ĝin antaŭ ol la sorto forprenos mian lastan spiron.

AMUZOJ

Ĉinaj proverboj

Frosto neniom timinda,
Senmoviĝo de l' membroj timiga.


Bonan manĝon oni meritas,
Se oni en laboro penon ne ŝparas.

Pli da homoj, pli da saĝo;
Pli da branĉoj, pli da fajro.

Al helpemulo helpon oni ne avaras.

Ludoj

Interŝanĝu la lokojn de la trianguloj kaj cirkloj en sep fojoj da movoj.



Por ĉiu fojo movu nur unu figuron je unu paŝo. Movo povas esti vertikala, horizontala kaj oblikva, sed ne trans alian figuron.

(Solvo trovebla en ĉi numero)

Humuraĵoj

Alfabeto

Instruisto: Rene, ĉu vi povas parkere legi la alfabeton?

Rene: Sendube.

Instruisto: Diru, kiu litero estas post A.

Rene: Ĉiuj aliaj.

Miskompreno

Iu gastis ĉe sia amiko en Parizo. La mastro varme akceptis lin. Sed la gasto restis tiel longe, ke la mastro malĝojiĝis. Tamen la gasto ankoraŭ ne intencis foriri, kaj la mastro fine demandis la gaston ĝentile: "Ĉu vi ne sopiras al viaj edzino kaj infanoj?"

La gasto respondis senprokraste: "Dankon pro via afableco; morgaŭ mi skribos, ke ili venu ĉi tien."

Avo kaj nepo (Karikatur)



De mia juna aĝo Esperanto estas la norda stelo de mia vivojo kaj la lumo en la malfacilaj tagoj. Mi kore dankas Esperanton. Mi sentas, ke mi devas redoni ion al Esperanto.

Kvankam mi foruzis la oran periodon de mia vivo sur la batalkampo, tamen de tiu tempo mia intereso pri literaturo kaj Esperanto neniam forlasis min. Intereso pri literaturo kaj Esperanto! Mi sentis ion, kaj mi provis knedi ion el la nebula intereso. De

tempo al tempo mi tradukis koreajn literaturaĵojn kaj foje mem verkis en Esperanto.

Pasis pli ol 50 jaroj. Post la aĝo 70, nun mi sentas, ke mi devas kolekti ilin kaj redoni ĝin al Esperanto."

Kiel sincera amo al literaturo kaj Esperanto! Nun ankaŭ mi aĝas pli ol 70 jarojn. Mi tre ĝojas pro la libro de mia bona amiko kaj kunbatalanto en la juneco. Ĉi-momente mi ne scias, kion li amas kaj kion malamas. Sed mi kredas, ke li estas honesta homo, kiu sin dediĉas al sia idealo. ■

Bergeno indas la vojaĝon

Bergeno, la plej grava loko ĉe la okcidenta marbordo de Norvegio, gastigos la 76-an Universalan Kongreson de Esperanto de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto ĉi-jare.

Bergeno havas historion de pli ol 900 jaroj kaj iom pli ol 200 000 loĝantojn. Kiel iama ĉefurbo de Norvegio, ĝi tradicie estas urbo malfermita al ĉiuj kontinentoj, kio faras la vivmanieron kaj mondkoncepton de la bergenanoj tre internaciaj. Kvankam ĝi estas malnova urbo, tamen ĝi impresas moderne kiel grava komerca urbo, ŝiptrafika haveno kaj kultura centro. Ĝi ankaŭ allogas per sia geografia situo sur mildaj fjord-deklivoj kaj montetoj, kun lago meze, amaso da verdo kaj rava ĉirkaŭaĵo.

Nun la norvegaj esperantistoj ĝojas duafoje gastigi la Universalan Kongreson post preskaŭ 40 jaroj. La Esperantomovado en Norvegio estas modesta laŭnombre, sed persista kaj solida. La LKK el 13 personoj tre kapablas kaj agemas. La kongresa programo preparata estas riĉa kaj provos esti nova, sekvante tamen tion, kio en la kongresa tradicio estas konservinda. Kongresanoj spertos interesajn kunvenojn kaj intiman renkontiĝon, ĝuos belajn koncertojn, norvegajn folklo-



En Bergeno

rajn dancojn kaj teatrajn spektaklojn en la komforta kongresejo Grieg-halo, dancos, bankedos, amikiĝos, aŭskultos prelegojn, ĉeestos aŭ mem partoprenos viglajn diskutojn, vojaĝos tra la urbo, ekskursos en ĝia ĉirkaŭaĵo...

La Bergena Kongreso ankaŭ havigos la okazon konatiĝi kun Norvegio, kiu estas iom speciala malnova ŝtato kaj travivis multajn interesajn epokojn, sed fariĝis sendependa en sia nuna formo de parlamenta monarkio

nur en 1905. Norvegio hodiaŭ estas moderna lando kun modernaj teknikaj profesioj. Ĝi famas pro siaj multaj fjordoj. Situante en Nordio, Norvegio havas historiajn kulturajn interrilatojn kaj intiman kunlaboron kun siaj najbaroj. Nun la nordia kunlaboro estas ĉiam pli atentata. Eble ĝuste pro tio, "Nordio — ĉu modelo?" estas proponita kiel temo de la ĉi-jara UK en Bergeno.

Bergeno, la ĉefurbo de la fjordoj, indas la vojaĝon. ■


La unua kaligrafo pri ĉinaj klasikaĵoj

Fotoj de WU XINHUA



Wang Hui kaj liaj mane transskribitaj libroj

La pli-ol-60-jara kaligrafo Wang Hui estas vicprofesoro de la Popola Hospitalo de Weifang, Shandong-provinco. La kaligrafio de Wang Hui kaj Zheng Banqiao (fama kaligrafo de Qing-dinastio, kiu vivis de 1693 ĝis 1766 kaj iam funkciis kiel ŝtaticisto en Weifang) kaj la surskribo sur Tang-dinastiaj steleoj karakteriziĝas per simpleco kaj forteco. La verkoj de Wang Hui ricevis laŭdon de multaj kaligrafoj. Luj el liaj verkoj estas kolektitaj en la libro "Modernaj Ĉinaj Kaligrafoj". En 1986 li emeritiĝis. Poste li mane transskribis "Songo en Ruĝa Buduaro", "Tri Regno", "Jin Ping Mei" kaj aliajn 3 famajn ĉinajn klasikaĵojn, "Bencao Gangmu", "Huangdi Neijing" kaj aliajn 2 antikvajn ĉinajn farmakopeojn kaj la monumentan verkon de la nuntempa Ĉinio "Plena Vortaro de Ĉina Kaligrafio". La 11 verkoj en okonfolia formato havas pli ol 10 milionojn da ĉinaj ideogramoj. Stakigitaj, ili altas 5 m. Tial ili estas rigardataj kiel rekordo de ĉinaj mane transskribitaj libroj.



Kaligrafajo de Wang Hui

Libroj de ĈEE en 1990

Profilo de Zhou Enlai verkita de Percy Jucheng Fang kaj Lucy Guinong J. Fang, esperantigita de Wang Chongfang. 13×18.5 cm., 298 p., USD 8,90.

Ĝi estas la unua biografio, kiun ĉinaj aŭtoroj verkis por konigi al eksterlandaj legantoj la brilan vivon de la ĉina elstara politikisto, ŝtatisto kaj proleta revoluciisto Zhou Enlai.

Per viveca kaj lakona lingvo la libro kun 67 fotoj priskribas la travivaĵon de Zhou Enlai.

Ĉina Antologio (1949-1979) kompilita de Zhao Muying, tradukita de S.J.Zee, Laŭlum k. a. 14,7×21 cm., 426 p., bind., USD 13,30.

la kolekto estas la dua volumo de la antologio (la unua volumo aperis en 1986). En ĝi kolektiĝas noveloj, poemoj, eseoj kaj raportaĵo verkita de Bakin, Bingxin, Zhou Libo kaj aliaj 36 nuntempaj verkistoj dum 1949-1979. Tiuj ĉi verkoj reaperigas malsamajn facetojn de tiutempa socia vivo de Ĉinio kaj servas al la legantoj kiel fenestro por koni la spiritan fizionomion de la ĉina popolo kaj nuntempan literaturon de Ĉinio.

Frosta Nokto verkita de Bakin, elĉinigitita de Laŭlum. 14,5×21 cm., 328 p., bind., USD 9,15.

La romano prenas la vivon de Chongqing, la "Milittempa Ĉefurbo" de la malnova Ĉinio, dum la jaroj 1944 kaj 1945, kiel la fonon, kaj spegulas mizeran vivon kaŭzitan de militado al popoloj, per la familia tragedio de iu bonkora intelektulo. Post sia diplomitiĝo el universitato la heroo Wang Wenxuan laboris kiel korektisto, lia juna kaj bela edzino laboris kiel komizino de banko. Ili malfacile vivtenis sian 4-membran familion per mizera enspezo. La ekonomiaj malfacilaĵoj profundigis konflikton inter bopatrino kaj bofilino. Pro tio Wang Wenxuan ofte falis en dilemon kaj nur senvorte englutis larmojn. Krome li suferis de ftizo kaj perdis laboron. La edzino iris for kaj li mortis de malsano kaj malsato. Kiam la edzino revenis al sia malnova loĝejo kaj informiĝis, ke la edzo jam mortis kaj la filo kaj bopatrino jam transloĝiĝis al nekonata loko, estis videbla por ŝi nur obskuro kaj mizero

kaj fine ŝi sola malaperis en frosta nokto.

Antikvaj Ĉinaj Sciencistoj kompilita de Cao Bailong kaj Zhang Qingzhen, tradukita de Dai Song'en kaj Xue Meixian. 12,2×18,3 cm., 148 p., USD 3,25.

La libro, per facila kaj komprenebla lingvo, konigas 20 famajn ĉinajn sciencistojn dum dumil jaroj. Inter ili estas medicinisto, akvoutiliga specialisto, geografo, matematikisto, agronomo, astronomo, renovigistino de ŝpinteksa tekniko. Leginte la libron legantoj povas koni diligen-tecon, saĝecon kaj grandajn sukcesojn de tiuj sciencistoj. La libro estas ilustrita per 20 bildoj.

Paŝtisto kaj Feino kompilita de Zheng Zhenjie, tradukita de Li Baofa kaj Yao Baoyin. 11×18 cm., 76 p., USD 1,60.


En la ilustrita libro estas kolektitaj rakontoj vaste cirkulantaj inter hanoj, manĉuroj, mongoloj, koreoj, dahuroj, olunĉunoj en la Nordoriento de Ĉinio. Ili prezentas, de malsamaj flankoj, la ekonomian staton, socian vivon, religion kaj morojn de tiuj naciecoj en la pasintaj jarcentoj. La popolaj rakontoj estas riĉaj je romantikismo kaj alegorio.

Ĉinaj Klasikaj Poemoj Ilustritaj kompilita de Wang Yanbo kaj Ren Guang, pentrita de Yang Yongqing, esperantigita de Laŭlum kaj angligita de Laoyang. 26,2×19 cm., 72 p., bind., USD 8,25.

La libro entenas 52 famajn antikvajn poemojn kaj 52 belajn pentraĵojn respondantajn al la poemoj. Dank' al tio legantoj povas facile kompreni kaj apreci ilin.

Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en 11 lingvoj projektita, kompilita kaj redaktita de F. Munniksma de Nederlando. 15×22 cm., 720 p., bind., USD 29.

La vortaro en Esperanto kaj la lingvoj angla, germana, hispana, franca, itala, nederlanda, portugala, sveda, japana kaj ĉina enhavas 2 800 terminojn specifajn pri organizo kaj tekniko de la komerco, ekonomiko kaj sociala ekonomiko. Ĉiuj enmetitaj terminoj estas vicigitaj laŭ angla alfabeto kaj klarigitaj en la angla lingvo kaj



English	International business dictionary in 11 languages
Esperanto	Internacia komerca-ekonomika vortaro en 11 lingvoj
Deutsch	Internationales Wörterbuch für Handel und Wirtschaft
Español	Diccionario internacional de comercio y economía
Français	Dictionnaire international du commerce et de l'économie
Italiano	Dizionario internazionale per il commercio e per l'economia
Nederlands	Internationaal woordenboek voor handel en economie
Português	Dicionário internacional de comércio e economia
Svensk	Internationell ordbok för handel och ekonomi
日本語 汉语	国際貿易経済辞典 国际經

Esperanto.

En la fino de la vortaro oni povas trovi indekson de Esperanto kaj aliaj 10 lingvoj kaj liston pri landaj kaj valutaj nomoj de la mondo en 11 lingvoj. Pro sia amplekseco kaj ĝusta difino la vortaro estas disponebla kiel efika instrumento en la komerca kaj ekonomika laboro.

Anatomia Nomenklatur: 19,5×26,5 cm., 708 p., bind., USD 29.

La 5-lingva vortaro estas kune kompilita kaj tradukita de ĉina Li Kexi kaj franca A. Albault, surbaze de la kvina eldono de «Nomina Anatomica» de la Internacia Anatomia Nomenklatura Komitato, kaj reviziita de profesoro Huang Ying, ĉefredaktoro de la gazeto «Anatomio» eldonita de la Ĉina Societo de Anatomio. Ĉiu artikolo estas en la latina, angla, franca, Esperanta kaj ĉina lingvoj. En la lasta parto de la libro estas supre diritaj 5-lingvaj indeksoj. Ĝi, kiel utila ilo, servas ne nur al la anatomoj kaj klinikistoj, sed ankaŭ al sciencistoj, studentoj de altlernejoj kaj tradukistoj pro sia praktika uzo.

Unu el la solvoj

5→1, 3→5, 7→3, 4→7, 6→4, 2→6, 1→2

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

USD	11.50	18.50	26.00
-----	-------	-------	-------

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

USD	7.80	12.50	17.50
-----	------	-------	-------




“Gastoj” travinrantaj en

Teksto de HU YUN

Fotoj de LIU SIGONG

Turistoj amuziĝas kun ruĝbekaj mevoj.

Rigardantoj de ruĝbekaj mevoj




Ruĝbekaj mevoj




Kunming


Infanoj donas nutraĵon al ruĝbekaj mevoj



Aŭtomobiloj ĝenataj de ruĝbekaj mevoj



Sur tegmentoj de loĝdomoj



EN la vintro antaŭ ses jaroj, multe da ruĝbekaj mevoj aperis en la kvartaloj de la urbo Kunming. Knarante, ili jen ripozis sur tegmentoj de loĝdomoj, jen cirkle flugis en la aero, jen serĉis manĝaĵon en Panlong-rivero, jen sin amuzis sur la lagoj de parkoj. Tre ĝojigis la loĝantojn de Kunming tio, ke subite venis tiom multe da mevoj. La mevo fariĝis ŝatata temo de babilado.

Fakte, tiuspecaj migrantaj birdoj antaŭe travintris en la proksima ĉirkaŭurbo de Kunming, sed nur en tiu vintro ili enflugis en la urbon. Kaj ili multiĝis jaron post jaro. S-ro Zhao, laboranto de la medio-esplora instituto de la urbo, diris al mi, ke la birdoj generas en nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio kaj Sovetunio. Februare de 1987, oni trovis birdon kun ring-signo "Moskvo, USSR". Ili restadas en la urbo de la mezo de novembro ĝis la dua deko de marto de la sekvanta jaro, ĉ. 120 tagojn.

En la pasinta vintro mi vidis ruĝbekajn mevojn. Vere ne malvarma estis la vintro de Kunming. La suno varmete lumis al mi, eksterdome oni bezonis vesti sin nur per dika lan-trikotaĵo. Verdaj estis la arboj ambaŭflanke de la stratoj. Ne mirinde, ke Kunming estas titolita "printempa urbo". Frumatene mi venis al Nantai-ponto proksime de la urbocentra placo. Mia amiko diris al mi, ke matene ĉi tie koncentriĝas plej multaj mevoj. Tiam, la trotuaroj de la ponto estis plenaj de rigardantoj. Sekvante ilian rigardon, mi vidis, ke la foraj grizaj tegmentoj de domoj estas makulitaj per amasoj da blankaj mevoj. Sub la ponto sufiĉe granda spaco de akva surfaco estis blankigita de la birdoj. Ŝajne je ordono, la blankaj mevoj subite leviĝis, sin pafis al la ĉielo, kaj tuj poste sin turnis kaj ĵetis al la akva surfaco, kio kreis

ovalan ringon. En la varma sino de la printempa urbo Kunming, la birdoj venintaj de malproksimaj lokoj libere kaj sate flugadis, kantadis, formante blankan ringon kun knarado. Fine, la ringo turniĝanta venis super la homamasojn, kiuj ekbolis de ĝojo. Oni elprenis la pretan manĝaĵon kaj ĵetis ĝin al la mevoj. La mevoj lerte kaptis la manĝaĵon per la beko, kio vekadis ĝojan ridon inter la homamasoj.

Mi, infektita de tiu ĉi gaja atmosfero, urĝiĝis serĉi manĝaĵon por nutri la mevojn. Nur nun mi trovis, ke ĉe la ponto estas nemalmulte da kolportistoj, kiuj vendis panojn. Kiam oni trovis, ke la ruĝbekaj mevoj, kiuj ŝatas manĝi fiŝojn, salikokojn kaj insektojn, manĝas ankaŭ panon kaj biskviton, ili komencis nutri mevojn per tiuj manĝaĵoj, sekve prosperiĝis la panovendo. Mi aĉetis kelkajn panojn ĉe blankhara maljunulino. Mi kaj ĵetis la panerojn al la mevoj kaj babilis kun la maljunulino. Ŝi konigis al mi, ke ŝia familiano laboras en panofabriko, ke ŝiaj panoj estis faritaj de la fabriko speciale por mevoj, kaj ke grandnombraj estis la rigardantoj, inter kiuj estis lokanoj, alilokanoj kaj alilandanoj. Ŝi diris plu al mi, ke foje, kvar guangdong-anoj aĉetis 500 panojn kaj eknutris mevojn sidante surtere. Kiel ĝojaj ili estis, vi ne povas imagi. Dum ŝi ĝoje rakontis, venis homoj por aĉeti panojn.

Mevoj fariĝis natura vidindaĵo de Kunming en vintro. Trapasante la lokon, kie sin distris mevoj, oni pretervole haltis por ilin spekti. Pli-ol-70-jara maljunulo, helpate de sia filino, venis sur la ponton por nutri mevojn per sia tremetanta mano. Emerito, iama laboranto de medioprotekta buroo, diris, ke en la komenco iuj ĉasis mevojn, la magistrato ĝustatempe postulis, ke la loĝantoj protektu mevojn, kaj decidis, ke la registaro punos la mevoĉasanton. La registaro ankaŭ asignis

specialan monsumon por provizi mevojn per nutraĵoj en fiksaĵoj. Esploristoj fiksis ringsignojn al dekoj da mevoj kaj poste trovis ke tiuj mevoj revenis en la sekvantaj jaroj. En la lastaj du jaroj multe kreskis la nombro de mevoj vintrantaj en Kunming, ĉi-jare venis al Kunming ĉ. 10 000 mevoj.

Kunming-anoj protektas mevojn, dum mevoj intimiĝas kun la loĝantoj. Sur Desheng-ponto nemalproksime de Nantai-ponto, mi vidis ke grupoj kaj grupoj da mevoj flugas inter veturantaj aŭtoj, en bicikla torento, eĉ sentime paradis sur strato, ke ŝoforoj devis malrapidigi, eĉ haltigi sian aŭton por lasi ilin transpasi. Tio multe ĝenis ŝoforojn, tamen ege ĝojigis petolemajn infanojn. Ili eĉ ŝutis panpecetojn sur straton por la birdoj. Knabino kun du mallongaj harligoj montris al mi panon en la mano kaj diris, ke tio estas ŝia kvina pano por mevoj, ke en vintra ferio ŝi venis nutri mevojn ĉiumatene, kaj ke ankaŭ ŝiaj kunlernantoj ŝatis tion fari. Kiam ŝi ĝoje rakontis, subite meva fekaĵo falis kaj trafis ŝian rozkoloran lan-trikotaĵon, ŝi time ekkriis.

Posttagmeze, la mevoj flugis al la lago de parko, ili ŝajne estis multe pli kvietaj ol en mateno. Ili libere naĝis en la akvo. Kelkaj mevoj sentime saltetis antaŭ mi sur la ŝtona bordo de la lago kaj konkure bekis la panpecetojn ĵetitajn de mi. Tre belaj estis mevoj: blankaj plumoj, oranĝruĝaj beko kaj piedoj, delikataj plumetoj ĉe la kolo, kio logis min al karesado. Turistoj el Hongkong fotis sin kun mevoj. Ili diris, ke estas multaj altaj etaĝdomoj en Hongkong, tamen oni ne povas spekti belan naturan pejzaĝon. Vere bela estis la parko. Sub la vespera suno brilis la lagakvo, sur kiu veturis ĉiaformaj boatoj, kaj ĉirkaŭ ili sin amuzis blankaj mevoj. ■



ARTOJ DE ĈINIO

Skulptistino el stepo

de CAO WEI

Zona

EN la Ŝtata Olimpika Centro de Ĉinio staras 2.2-metra mongolo skulptita el nigra marmoro. La skulptaĵo de brava viro preĝanta al la ĉielo por akiri forton estas kreita ne de viro, sed de mongola skulptistino Zona.

Zona estas filino de mongola pentristo. La braveco de la rajdanta mongola nacio dotis ŝin per temperamento de nefleksebleco, dum la patro dotis ŝin per saĝaj sensivaj okuloj. En 1969, kiam ŝi estis 15-jara, ŝi komencis okupi sin pri belarto. En la pasintaj 20 jaroj la ĝojigajn sukcesojn en verkado ĉiam akompanis malfacileco en la vivo. Ŝi laboris en teatro kiel dekoraciistino, en fabriko kaj en la kamparo. Poste, ŝi havis fortunon studi en la arta fakultato de la Normala Universitato de la Interna Mongolio kaj en la Ĉina Centra Belarta Instituto.

Ŝi ne forgesis akumulon de la vivo dum la arta strebado. Ŝi plurfoje venis al stepo malproksima de urbo por sperti kun siaj samnaci-anoj la legendan vivon de siaj prapatroj. En 1981, por ĝui la nokton de la centro de stepo, ŝi sola tranoktis sur sovaĝa stepo malgraŭ deadmono de siaj kamaradoj. La roso friska, la stelaro maldensa, la

hurlo de lupoj klara. Kiam tagiĝis, ŝiaj larmaj okuloj sensis la eksterordinaran freŝecon de mateno sur la stepo. Ŝi sorbis ĉion ĉi tion en sian animon kaj enkorpigis en siajn skulptaĵojn stepan odoron.

Oni ŝatas diri, ke ĉarmo de viro kuŝas en vira braveco kun ia mildeco, dum beleco de virino konsistas en mildeco kun ioma vira braveco. La skulptaĵoj de Zona plene montras la virinan karakteron kaj de mildeco kaj de braveco.

«Rajdanta pafistino» estas la unua verkaĵo de Zona. La kvalito de bronzo simbolas firman animon de mongola junulino. La pozo de streĉado de pafarko facile memorigas pri la mongola heroo Ĝenĝis Ĥano. «Ĉevalo ekflugonta» estas signifa mejloŝtono en la skulptista vivo de Zona. Ĝi staras kiel blazono en la placo antaŭ la Fervoja Stacidomo de Hohhot, ĉefurbo de la Interna Mongolio. Sur alta soklo, la ĉevalo el rustimuna ŝtalo staras sur la postaj piedoj por flugi al la ĉielo.

Krom fortikeco, Zona havas ankaŭ mildan temperanton de filino kaj patrino. «Novedzino» estas ŝia karakteriza verkaĵo. La skulptaĵo el blanka marmoro altas 90 cm. kaj pezas 400 kg. Pere de miksitaj tranĉoj krudaj kaj delikataj, ŝi


sukcese animis la kvieton, belecon kaj subtilan korstaton al la novedzino. «Estonteco» kaj «Patrino kaj Filo» atestas prikantindan patrinecon de la mongolaj virinoj. «Estonteco» temas pri patrino simple skulptita. La detalaĵoj sur la vizaĝo kaj la korpo estis intence neglektitaj. Kun infano en la sino, ŝi rigardas sor, ion esperante, aŭ per kontentiĝo kaj fiero de patrino paradante. «Patrino kaj Filo» temas ankaŭ pri patrino, kiu ŝirmas per la korpo sian infanon kontraŭ vintra frostoj.

Zona konkludis el sia malglata travivaĵo, ke estas malfacile esti virino, precipe esti kariera virino. Ŝi havas filon, sed ŝi ne povis doni al li pli da kareso, ĉar la arta kariero multe okupis ŝian tempon. Ŝi diris, ke ŝia karaktero rezultas el la malglata travivaĵo. «Mi estas patrino, tamen mi ne povas kompensi la perditan kareson al la filo... por hodiaŭ mi oferis mian hieraŭon, kaj por morgaŭ, mi ofertas la hodiaŭon...»

Ŝia senlaca strebado en arto estis rekompencita: la 7-an de decembro de 1988, ekspozicio de ŝiaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj estis solene inaŭgurita en la Kultura Palaco de Naciecoj. En la admirado de la rigardantoj ŝi sentis sin honore rekompencita. ■



"Novedzino"




"Šafoduopo" (Blankmarmora skulptaĵo)

"Rajdanta Pafistino"






"Patrino kaj Filo"



"Preĝado"

"Mongola virino" (Lignoskulptaĵo)



Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (II)

de ZHANG LEI

LA POLITIKO DE NASKOLIMIGO

La konstitucio de Ĉinio difinis, ke la ŝtato praktikas naskolimigan politikon, por ke la kresko de la loĝantaro konformu al la disvolviĝo de la ekonomio kaj la socio, kaj ke ambaŭ flankoj de la geedzoj devas observi la politikon. Laŭ tiu difino de la konstitucio, la ĉina registaro prenas la politikojn de naskolimigo kaj altigo de la loĝantara kvalito kiel fundamentajn politikojn de la ŝtato, kaj decidis pli kaj pli perfektigi la politikojn.

La nuna politiko de naskolimigo de Ĉinio inkluzivas jenajn artikolojn: proponi malfruan geedziĝon kaj malfruan naskon, akcenti eŭgenikon, proponi al ĉiu paro da geedzoj en urboj naski nur unu infanon, kaj ankaŭ al la geedzoj en la kamparo, escepte se ili havas apartan malfacilon, ili povas havi du infanojn, sed plurajn jarojn post la naskiĝo de la unua infano, tamen neniu paro devas havi trian infanon krom tio permesita de specialaj difinoj de la ŝtato. La kondiĉoj por naski duan infanon estas difinitaj de la registaroj de provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj rekte sub la centra registaro. La politiko de naskolimigo devas esti praktikata ankaŭ en la regionoj de nacimalplimulto, por ke la lokoj pli frue forskuu malriĉecon kaj prosperiĝu. Konkretaj paŝoj estas difinitaj de la respondaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj laŭ konkretaj kondiĉoj.

Bildo pri naskolimigo ĉe strato en Pekino



Ĉinio havas vastan teritorion kaj multajn naciojn. Grandaj diferencoj troviĝas en diversaj lokoj je naturaj kondiĉoj, naciecoj, densecoj de loĝantaro, ekonomio kaj kulturo, sekve multe diferencas la naskolimigaj laboroj. Pro tio fleksebleco en la praktikado de naskolimigo estas necesa por diversaj lokoj.

La praktikado de naskolimigo en Ĉinio sin bazas sur la principo de ŝtata gvido kaj memvoleco de popolanoj. Ĉe la komenco de la praktiko la naskolimiga politiko ne estis komprenata kaj akceptita de parto da homoj, precipe de kamparanoj, ĉar naskolimigo estas multe malsama ol la tradicia ideologio pri generado, ekzemple “filo — vivtenanto de la gepatroj en maljuneco”, “pli da infanoj, pli da bono” k.s., kaj krome familio kun solinfanoj renkontas iajn konkretajn malfacilojn. Sed la naskolimigo konformas al la baza intereso de la tuta popolo, kaj la koncernaj departementoj de la registaroj daŭre propagandis kaj persvadis, la popolo perceptis la avantaĝojn de naskolimigo, tial la politiko de naskolimigo estas komprenata kaj akceptita de la popolo. Nun la ĉefaj taskoj en la praktikado de naskolimigo estas stabiligi kaj kontinuiigi la politikon, por ke la nuna naskolimiga politiko estu sukcese praktikata en la vasta kamparo. Post penado oni devas unue malaltigi la naskokvanton al la substitua nivelo kaj due al la nula kresko. Espereble, la loĝantaro de Ĉinio en la mezo de la venonta jarcento estos 1.5 miliardoj.

Iuj fremdlandaj komentariistoj montris nekomprenon pri la naskolimiga politiko de Ĉinio, iuj eĉ kritikis, ke la naskolimigo en Ĉinio estas malhumanisma. Fakte oni facile rimarkas en la artikolo sub tiu ĉi titolo en la antaŭa numero, ke la naskolimiga politiko konformas al la reala stato de Ĉinio, ke ĝia praktiko akcelos prosperiĝon de Ĉinio kaj pliboniĝon de la popola vivo, kaj ke ĝi estas strategia politiko feliĉiganta postajn generaciojn. La celo de la naskolimiga politiko estas garantii la bazan rajton de homoj — la rajton de ekzisto, tial la politiko estas humanisma. Se oni ne havas sufiĉe da pano, nek vestojn, loĝejon kaj edukadon, por li la homa rajto kaj humanismo estas nur kastelo en la aero. Fakte, la naskolimiga politiko de Ĉinio jam estas atentata kaj jesita de multaj landoj, precipe de landoj de la

tria mondo.

ĈEFAJ RIMEDOJ POR BREMSI KRESKON DE LOĜANTARO

De la sepdekaj jaroj la ĉina registaro alprenis jenajn rimedojn kaj metodojn por bremsi la tro rapidan kreskon de la loĝantaro:

Unue, profundigi la konon de la oficistoj de la diversnivelaj registaroj pri la naskolimiga laboro. Ŝlosilo de sukceso de la naskolimiga laboro estas en la mano de la gvidantoj. Tial oficistoj de diversnivelaj registaroj nepre devas intensigi konceptojn pri nombro de loĝantoj kaj pokapa meznombra kvanto de produktaĵoj kaj meti la naskolimigan laboron sur gravan lokon en la tagordo kaj en la ĝeneralan projekton de la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo de sia loko. Registaroj de ĉiuj niveloj devas praktiki respondecan sistemon de administrado super loĝantaro kaj naskolimigo. Plenumiĝo de loĝantara plano kaj tiu de la naskolimiga politiko devas esti gravaj kriterioj por ekzameni la diversnivelajn registarojn kaj gvidantojn.

Due, ofte kaj ripetade propagandi kaj eduki la tutan popolon per radiodisaŭdigo, televizio, ĵurnaloj k.s. Ekzemple, konigi la aktualajn statojn kaj politikojn de Ĉinio, la loĝantaran situacion frontatan de la lando, la ĝustan solvon de la problemo de kontraŭstaro de la ŝtata intereso kaj individua intereso, la ĝustan solvon de la konflikto inter la longatempa intereso kaj proksima intereso, kaj ankaŭ abocon de naskolimigo. La celo estas ŝanĝi la ideologion de la vastaj popolanoj pri generado kaj altigi iliajn komprenon kaj akceptivon pri la naskolimigo kaj eŭgeniko.

Trie, gravigi la scienca-teknikan laboron por liveri naskolimigan servon al la naskoagaĝ geedzoj. Nun Ĉinio posedas serion da kontraŭkoncipaj iloj kaj tekniko, kio liveras al la ĉinaj naskoagaĝ virinoj pli sekurajn, pli oportunajn kaj pli malmultekostajn kontraŭkoncipilojn kaj kontraŭkoncipan teknikon.

La gravito de la naskolimiga laboro estas en la ĉina kamparo, kaj ankaŭ tiu de la teknika servo estas tie. En la lastaj jaroj la koncernaj departementoj multe klopodis por popularigi la sciencajn sciojn de naskolimigo kaj disvastigi kontraŭkoncipan metodon longe efikantan. Krome iom post iom fondiĝis kaj kompletigis naskolimigaj servoretoj de la niveloj de gubernio, subgubernio kaj vilaĝo, kiuj disdonas kontraŭkoncipilojn, donas naskolimigan servon kaj trejnas laborulojn de naskolimigo.

Limigi la nombron de la loĝantaro kaj altigi la kvaliton de la loĝantaro estas du flankoj de la loĝantara politiko de Ĉinio. La naskolimigaj departementoj donas al naskoagaĝ geedzoj direkton pri naskolimigo kaj ankaŭ helpoj en eŭgeniko.

Kvare, praktiki sintezan administradon super la loĝantara problemo. Praktiki naskolimigon, bremsi

la kreskon de la loĝantaro kaj altigi ĝian kvaliton estas komplika sistema inĝenierio de la socio, tial estas necese kunligi la inĝenierion kun disvolvo de la ekonomio, ĝeneraligo de edukado, plibonigo de higieno kaj medicino, plibonigo de virina kaj infana sanprotekto, plibonigo de socia bonstatigo kaj socia garantio kaj altigo de socia pozicio de la virinoj. Tio postulas, ke la tuta socio emfazu kaj subtenu naskolimigan laboron kaj pretigu necesajn kondiĉojn por ĝi. De departementoj de la registaroj ellaboritaj socia-ekonomiaj politikoj devas esti favoraj al malfrua geedziĝo, malfrua nasko, naskolimigo kaj eŭgeniko.

En la pasintaj jaroj Ĉinio tre akcentis kombinon de helpado al malriĉaj regionoj kaj tiea naskolimiga laboro. Malriĉaj familioj observantaj naskolimigon estas monhelpataj, por ke la malriĉuloj sin liberigu el la stato "ju pli malriĉe, des pli multe naski; ju pli multe naski, des pli malriĉe". Certa sukceso estis akirita en disvolvo de ekonomio kaj brido de kresko de loĝantaro.

Por glate antaŭenpuŝi naskolimigon en la vasta kamparo, oni devas trankviligi la kamparanojn, kiuj timas, ke ili ne ricevos vivtenon en sia maljuneco. Por tio la ĉina registaro multe zorgis pri la afero de la socia garantio. En multaj lokoj oni diversmaniere klopodis por fondi pension surbaze de kunlaboro de tri flankoj: la ŝtato, kolektivo kaj individuoj, por ke la kamparanoj trankviliĝu en observo de naskolimigo.

Kvine, establi kaj perfektigi organizan strukturon de loĝantaro kaj naskolimigo: establi tra la tuta lando diversnivelajn administrajn instituciojn kun la naskolimiga komisiono kiel la ĉefa gvida organo; fondi diversajn instituciojn servantajn al la laboro pri loĝantaro kaj naskolimigo (inkluzive de propagando, edukado, teknika servo, kontraŭkoncipila liverado, scienca esplorado, informado k.a.); kaj fondi naskolimigan asocion, loĝantaran asocion kaj similajn popolajn organizojn. La institucioj de la tri specoj kunlaboras sub la unueca gvido de la registaro, por ke la naskolimiga laboro estu bone plenumita en diversaj niveloj. Nun en Ĉinio estas 180 mil naskolimigaj laboruloj de la nivelo de kaj sub gubernio, ĉirkaŭ 90% de la gubernioj, 30% de la subgubernioj kaj urbetoj kaj parto de la vilaĝoj havas sian naskolimigan servejo (aŭ servoĉambron). La Ĉina Naskolimiga Asocio havas sub si pli ol 600 mil bazajn filiojn kun 28 milionoj da membroj.

Sese, ellabori leĝon por la naskolimigo. Ĝis nun 28 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj publikigis sian lokan naskolimigan leĝon, por ke la oficistoj de la registaroj faru naskolimigan laboron laŭleĝe, por ke la civitanoj memvole gvidu siajn geedziĝan kaj naskan konduton per la leĝo kaj regularo. En la leĝoj estas limigo kaj premio. Geedzoj observantaj naskolimigon estos laŭdataj kaj premiaj, dum tiuj malobservantaj naskolimigon estos kritikataj kaj pagigataj por socia varto pro ekstera ŝarĝo de la socio kaŭzita de ilia eksterplana nasko. ■

Pacaj senditoj en

Teksto kaj fotoj de LI QIANG


Antaŭ la statuo de Laozio Foto de ZHENG XIANGMIN



Quanzhou (I)



La statuo de Manikeo



La Pajla Templo

Bonvenigo al la plezurŝipo "Paco" Foto de ZHENG XIANGMIN



**BONVENON AL GASTOJ
EN LA ANTIKVA HAVENO**

La 14-an de februaro 1991, antaŭvespere de la ĉina tradicia Prin-tempa Festo, la superluka plezurŝipo "Paco" kunportanta esplorgrupon pri la mara Silka Vojo, organizitan de Unesko, sonorigante sirenon, malrapide eniris en la dokon Houzhu de Quanzhou.

En la antikveco ĉe Quanzhou-golfo kaj aliaj golfetoj sude de ĝi troviĝis pluraj havenoj. Kun prosperiĝo de la mara Silka Vojo en la 8-a jarcento Quanzhou kiel grava haveno de Ĉinio fariĝis startpunkto de la vojo. En la 12-a, 13-a kaj 14-a jarcentoj Quanzhou atingis apogeon de sia disvolviĝo kaj funkciis kiel centro de la ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Fine de 1291 la mondfama itala vojaĝisto Marko Polo instrukiite akompanis mongolan principon al Persio por ŝia edziniĝo, ili ja startis de Quanzhou-haveno kaj komencis sian vojaĝon per marŝipo. Vidinte tiel multe da komercistoj el diversaj lokoj de la mondo en Quanzhou-haveno, li skribis en sia vojaĝnoto: "Eritrino estas unu el la plej grandaj havenoj en la mondo." (Quanzhou portas la nomon pro ĝiaj abundaj belaj eritrinaj floroj.)

Post duonjarcento maroka vojaĝisto Ibn Battutah venis al Quanzhou. Li diris, ke Quanzhou siatempe estis "la plej granda haveno en la mondo", tie estis "pli ol cent grandaj ŝipoj, sennombraj malgrandaj ŝipoj kaj montoj da varoj".

La antikva Quanzhou-haveno kolapsis pro diversaj kaŭzoj en la mezo de la 14-a jarcento. Oni neniam forgesis la kontribuojn de Quanzhou en la interŝanĝo de antikva civilizacio inter la Okcidento kaj Oriento. Ĉi-foje Unesko faris esploradon de la mara Silka Vojo kaj difinis Quanzhou kiel gravan esplorurbon. Tio atestas, kiel gravan rolon ĝi ludis en la esplorado de la mara Silka Vojo.

Je la 11-a tiutage sur la kajo de la antikva haveno Quanzhou, kie

ĵus finiĝis dragado, amasiĝis bonvenigantoj al la esplorgrupo. Akompanate de muziko en la stilo de suda Fujian-provinco, ili ludis bonaŭgurajn leondancon kaj drakodancon. Regis varma kaj gaja atmosfero sur la kajo. Estro de la esplorgrupo kaj reprezentanto de Unesko diris ekscitite: "Antaŭ tre tre longe niaj prapatroj venis ĉi tien per ligna ŝipo. Hodiaŭ ni vizitas la antikvan havenon Quanzhou per alia rimedo. La aktiva partopreno de Ĉinio kaj ĝia longa historio faros gravajn kontribuojn por sukcesigi la esploradon."

MISIO DE LA "PACO"

Ĉinaj silkaĵoj transportiĝis en aliajn landojn tra mara kaj tera vojoj jam antaŭ Kristo. En la pasintaj jaroj ĉinaj kaj alilandaj fakuloj akiris nemalmultajn sukcesojn en esplorado de la tera Silka Vojo, sed malmultajn en tiu de la mara Silka Vojo. Fakte, la transporto de ĉinaj silkaĵoj laŭ la mara vojo al aliaj landoj daŭris pli longe. Laŭ tiu vojo la ĉinaj silkaĵoj atingis pli multe da regionoj. Tio havis pli grandan influon en la historio, ol

tiu laŭ la tera vojo, tial la mara Silka Vojo estas esplorinda kaj studinda.

La unua grava aktivado de la "jardeko de la monda kultura evoluo" aprobita en la konferenco de UN en decembro 1986 ja estas "ampleksa esplorado pri la Silka Vojo". Ĝi ampleksas dek esplorajn problemojn, kiaj tiuj pri sabla, stepa, budhisma kaj mara silkaj vojoj.

Por esplori la maran Silkan Vojon, la sultana familio de Omano liveris la 11080-tonelan superlukan ŝipon "Paco". Ĝi, 136.39 m. longa kaj 21 m. larĝa, estis konstruita de fama germana ŝipkonstruejo en aprilo de 1987. Ĝi estas belforma kaj perfekte ekipita. En ĝi estas 130 litoj, unu ferdeko por helikoptero, unu duetaĝa remizo sufiĉe vasta por enteni 16 aŭtomobilojn, kaj avangardaj komunikaj ekipaĵoj, per kiu oni povas kontakti kun ajna regiono de la mondo.

La esplorado iniciatita de Unesko estas internacia kaj sinteza esplorado, translanda kaj plurfaka. Membroj de la esplorgrupo venis el 30 landoj, inkl. de Omano, Italio, Grekio, Egiptio, Ĉinio, Francio, Britio kaj Usono.

La 23-an de oktobro, 1990, la esplorŝipo "Paco" ekveturis de la

En la seminario



itala haveno Venecio, hejmloko de Marko Polo, laŭ la legenda antikva navigvojo de komercŝipoj, iris tra Adriatiko, Mediteraneo, Egea Maro, Sueza Kanalo, Ruĝa Maro, Araba Maro, Hindia Oceano, Malaka Markolo kaj Suda Ĉina Maro, kaj atingis Quanzhou. Poste ĝi veturis al la lastaj du lokoj de la esplorado — Korea Duoninsulo kaj Japanio.

PRI LA MARA SILKA VOJO

La esplorgrupo okazigis Internacian Seminarion pri Ĉinio kaj la Mara Silka Vojo en Quanzhou, ĝin ĉeestis pli ol cent fakuloj el 26 landoj. La seminario ricevis 55 disertaĵojn kaj 47 fakuloj donis lekcionojn en ĝi. Ili puŝis la esploron de la Silka Vojo al pli vasta kaj pli profunda kampo en la studo pri historio, ŝipkonstruado, navigacio, komercado, religio, elmigrado k.a.

La mara Silka Vojo estis surmara pasejo inter la antikva Ĉinio kaj la Okcidento. Per tiu ĉi komerca vojo oni transportis grandan kvanton da silkaĵoj, porcelanaĵoj kaj metalaĵoj de Ĉinio al aliaj landoj, kaj transportis grandan kvanton da okcidentaj medikamentoj, aromaĵoj kaj kuriozaĵoj en Ĉinion. Ĝi, kiel vojo de kultura

interŝanĝo, kunligis Ĉinion kun Grekio, Romano, Egiptio, Persio, Hindio kaj aliaj antikvaj landoj, kaj havis grandan influon sur la kulturen evoluon de diversnaciaj popoloj de la mondo.

La granda nombro da historiaj materialoj cititaj en la disertaĵoj de la fakuloj atestis, ke Ĉinio estas unu el la luliloj de la monda mara kulturo. La antikvaj ĉinaj ŝipoj kaj multaj antikvaj objektoj elterigitaj de la landoj ĉe la Silka Vojo montras, ke la kapabloj de navigado kaj ŝargado de la ĉinaj ŝipoj estis unuarangaj siatempe. Membroj de la esplorgrupo survoje trovis multe da porcelanaĵoj kaj steleoj, el kiuj nemalmultaj estis produktitaj de Quanzhou. Ili servas kiel atestoj por esplori la lokon kaj rolon de Quanzhou sur la Silka Vojo.

MUZEO DE MONDAJ RELIGIOJ

La estro de la esplorgrupo diris ĉe la fino de la aktivado: “Ni trovis en Quanzhou objektojn kaj atestojn de kuna ekzisto kaj reciproka influo de la religioj kristana, budaisma, islama kaj manikeisma, kiu jam malaperis nun, tial Quanzhou estas ideala loko por esplori kunekziston kaj reciprokajn in-

fluon de diversaj religiaj kulturoj. Tio estas grava eltrovo por Unesko.”

Kiam Quanzhou estis prospera, tien torentis araboj, persoj, hindoj, javanoj kaj eŭropanoj. Inter ili estis komercistoj, vojaĝistoj, bonzoj, misiistoj, maristoj, reĝidoj, aristokratoj kaj registaraj delegitoj. Ili alportis sian religian kredon kaj naciajn morojn. Sekve konstruiĝis temploj unu post alia en malsamaj civilizacioj kaj malsamaj artoj, proksime de la loĝdomoj kaj bazaroj. Estis mirinde en la monda religia kultura historio, ke pace vivis tie tiel multe da homoj kredantaj je malsamaj religioj.

En Quanzhou la esplorgrupo vizitis la famajn budhismajn templojn Kaiyuan kaj Chengtian kaj sur Qingyuan-monto rigardis statuon de Laozio skulptitan el unu peco da rokego, majstraĵon de taoisma skulpturo en Songdinastio. Kvankam Qingjing-templo ruiniĝis jam antaŭ longe, oni ankoraŭ povas imagi al si ĝian antaŭan imponecon. Ĝi, konstruita en 1009, estas la plej antikva templo en araba arkitekturo. Granda nombro da delikataj kristanismaj gravuraĵoj kun kruco surhavas la lingvojn ĉinan, araban, latinan kaj aliajn. Ili estas restaĵoj de katolikismo kaj nestorianismo, du kontraŭstaraj branĉoj de kristanismo en la mezepoko. La diversaj reliefoj iam starantaj en la Dekmil-dia Halo de hinda religio atestis la amikecan kontakton inter Ĉinio kaj Hindio, Babilonio, Persio kaj aliaj antikvaj civilizitaj landoj.

Menciindas la “Pajla Templo”, ruino de manikeismo, ununura en la hodiaŭa mondo. En sia prospero, manikeanoj estis milionaj, sed nun ili estas ne plu troveblaj. Oni malfacile vidas ĝiajn restaĵojn en la mondo. Kiam oni vidis statuon de Manikeo, bone koservatan kaj ununuran en la mondo, ili ege emociiĝis. Ili opiniis, ke la eltrovo estas unu el la plej gravaj rikoltoj en la esplorado. ■


La ruino de Qingjing-templo



PACAJ SENDITOJ EN QUANZHOU (I)

Esplorantoj kaj ĉinaj islamanoj
Foto de ZHENG XIANGMIN


En la adiaŭa ceremonio



En vilaĝo de huj-oj



Esplorantoj rigardas ŝtonajn gravuraĵojn sur Jiuri-monto pri la mara Silka Vojo.



● Atinginte Pekinon la 29-an de marto, eksprezidantino de la Singapura E-Asocio Lee Kim Kiew intervidiĝis kun laborantoj de la redakcio de "El Popola Ĉinio", la Ĉina E-Eldonejo kaj la Ĉina E-Ligo. Ŝi konigis al la ĉinaj samideanoj la E-movadon de Singapuro. En la intervidiĝo ili montris la deziron de plua kontakto.

● La 2-a Ĉina E-kongreso estas en streĉa preparado. Ĝi okazos en Wuhan aŭtune de 1991.

● La Chenzhou-a E-Asocio de Hunan-provinco nun kolektas monon por konstrui Esperan Angulon en la fama turisma loko Suxian-monto. Tie sur rokmuro de la montpinto oni gravuros gigantajn desegnon, konsistantan el VCZE kun signifo: "Venkos Chenzhou-a Esperanto-movado", kiuj formos flugantan kolombon, tenantan verdan stelon ĉe la beko. Super la desegno legiĝos ĉinaj ideogramoj signifantaj "Espera Angulo". Kaj oni konstruos tie verdstelan kioskon paralelan kun Sanjue-monumento. (Sur ĝi troviĝas poemoj kaj aliaj vortoj de antikvaj famuloj).

Nun la Chenzhou-a E-Asocio

aktive laboras por kolekti monon de esperantistoj, E-organizoj kaj Esp-amikoj.

Komunikiĝu kun Zuo Caiyuan, la Fervoja Mezlernejo de Chenzhou, 423000, Hunan, Ĉinio

● Lastatempe la Junulara Sekcio de la Ŝanhaja E-Asocio trifoje faris konsultigon pri Esperanto, ekspoziciis Esperantajn librojn, revuojn, poŝtaĵojn, fotojn kaj disdonis materialojn pri Esperanto kaj la vivo de Zamenhof. Mil personoj vizitis la ekspozicion kaj pli ol cent personoj faris konsultadon. Krome, la E-Asocio sub la Orientĉinia Instruista Universitato faros turneon en 8 ŝanhajaj altlernejoj por propagandi Esperanton.

● Por prepari la Pacifikan Kongreson de Esperanto okazonta en Qingdao, 1992, kaj akceli E-movadon, la Hangzhou-a E-Asocio ekfunkciigis la 3-an de marto konversacian E-kurson por ĉiĉeronoj en kiu lernas 24 kursanoj. La kurso daŭros 5 monatojn.

● Dank' al la aŭspicioj, 47 ĉinaj esperantistoj senpage aliĝos al la Universala Esperanto-Asocio kiel novaj membroj de

UEA en 1991. Pri la aktivado respondecas d-ro So Gilsu, estrarano de UEA. La kandidato devas sendi artikolon kun enhavo: 1) "Konciza sinprezento" 2) "Kiel mi aktivis por nia movado en 1991?" kaj 3) "Kiel mi bonigos la movadon en mia regiono?". Sendu vian artikolon antaŭ la fino de novembro 1991.

● La Filio de PEA en urbo Gliwice invitas al internacia renkontiĝo organizata por festi 30-jaran datrevenon de sia fondiĝo. La solenaĵoj okazos de la 19.07.1991 ĝis la 24.07.1991 en Fervojista Teknikumo en Gliwice ĉe la strato Chorzowska 5. La programo de la renkontiĝo estas esperantaj aferoj, fervojistaj problemoj, nekutimaj kuracmetodoj kaj ankaŭ granda balo, interesaj prelegoj, ekskursoj, gajaj amuzaj vesperoj.

● Rememorante sian longjaran membron kaj estron Tibor Sekelj, verkiston, esperantiston, Esperanto-Societo el Subotica kunlabore kun Ĉokolad- kaj Bombon-produkta Entrepreno PIONIR, same el Subotica, lanĉis internacian konkurson de infanaj desegnaĵoj, sub la titolo "Ilustru ni kune". Partopreni en la konkurso rajtas infanoj naskiĝintaj en 1976 aŭ pli junaj. La temo de la konkurso estas ilustraĵo por la libro de Tibor Sekelj "Kumeĉaĉa, la filo de ĝangalo". Formaton kaj la teknikon de sia verko la konkursantoj rajtas mem elekti. La konkursaĵojn sendu plej malfrue ĝis la 31-a de aŭgusto 1991 al la adreso: Esperanto, Internacia Konkurso, Trg Slobode 1, 24000 Subotica, Jugoslavio.

● La 8-an kaj 9-an de marto, NHK (Japana Brodkasta Korporacio) en sia televida ĉinlingva kurso dufoje konigis grandan interesigon de ĉinoj pri Esperanto kaj prezentis parton de la ĉina televida Esperanto-kursoserio "Espero" kaj montris ties lernolibron.

Lee Kim Kiew (la tria de maldekstre) kaj laborantoj de la redakcio de "El Popola Ĉinio"



EKONOMIO

- Fundamente solviĝis en la fino de 1990 la problemo de malsato, kiu ĉagrenis ĉinojn dum jarmiloj. Nun la malsataj loĝantoj en Ĉinio konsistigas malpli ol 3% de la loĝantaro de la lando. La kamparanoj, kiuj konsistigas trionon de la loĝantoj en la ĉina kamparo, ĉe la orienta marbordo kaj en la antaŭurboj de grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio, nun marŝas al bonhaveco post solvo de la problemo pri vestoj kaj manĝaĵoj.

- En la pasintaj 40 jaroj, post kiam pace liberiĝis Tibeto, la materia kaj kultura vivo de la tibetanoj rimarkinde pliboniĝis. Nun en la tuta regiono la problemo pri vestoj kaj manĝaĵoj jam solviĝis. En 1990 la totala produktokvanto de greno atingis 555 milionojn da kg. kaj la totala nombro de brutoj 9.74 milionojn kaj la pokapa kvanto de greno duobliĝis kompare kun tiu antaŭ la liberiĝo. 90% de la urbaj familioj havas koloran televidilon kaj aliajn elektrajn aparatojn. Multe pliboniĝis la trafiko, edukado kaj loĝkondiĉoj. Nun la urbaj kvartaloj de Lhasa kovras 40 kvadratajn kilometrojn, sed antaŭ 40 jaroj nur 3 kvadratajn kilometrojn. Nun la pokapa loĝ-areo estas 9 kvadrataj metroj. Proksimume 80% de la tibetaj paŝtistoj loĝas en novaj domoj.

- En la pasintaj 10 jaroj Ĉinio praktikis tutlandan devigan arboplantadon, meznombro ĉiu ĉino partoprenis 2-foje arboplantadon kaj oni plantis entute 10 miliardojn da arboj.

SOCIO

- Nun Ĉinio havas 5 nacimalplimultajn aŭtonomajn regionojn, 31 nacimalplimultajn aŭtonomajn subprovincojn, 121 nacimalplimultajn aŭtonomajn guberniojn kaj 3 nacimalplimultajn aŭtonomajn ho-

Nova generacio en Tibeto



ŝojn. La nombro de la aŭtonomaj gubernioj kaj hoŝoj kaj tiuj regataj de la aŭtonomaj regionoj kaj subprovincoj estas 589, kiuj konsistigas 31% de la totala nombro de la ĉinaj gubernioj.

Laŭ statistiko la areo de la nacimalplimultaj aŭtonomaj lokoj konsistigas 60% de la totala teritorio de Ĉinio. Tie loĝas 90% de la ĉinaj nacimalplimultanoj.

- Nun en Ĉinio 150 virinoj funkcias kiel urbestro aŭ vicurbestro. Plejparto de ili aĝas 35-46 jarojn kaj 3/4 studis en altlernejo.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- Ĉina geologo Liu Dunyi konstatis per alt-difina sekundara jona maso-spektrometro, ke la plej antikva terkrusto de Ĉinio aĝas 3.8 miliardojn da jaroj.

- La 11-an de marto en Nankino de Jiangsu-provinco naskiĝis 3 kunikloj kun samaj heredaj trajtoj. Ili estas la unuaj kunikloj akiritaj per ĉelnukea transplantado. Tio markas, ke Ĉinio atingis novajn sukcesojn en esplorado de la inĝenierio de bestaj embrioj.

- La Bestoĝardeno de Chengdu kaj la Produkta Bazo de Grandaj Pandoj de Chengdu, Sichuan-provinco, akiris rimarkindajn sukcesojn en multigo de grandaj pandoj.

La granda pandino Meimei sola naskis 8-foje 11 idojn, el kiuj 6 vivas. Nun ŝi jam havas nepojn. Ŝia filino Qingqing naskis ĝemelojn, kiuj kreskas sane. Krome, oni per fridigita spermo faris artan ensemadon al seksardaj pandinoj, kaj tiel naskiĝis la unua granda pando embriiginta el fridigita spermo.

MEDICINO

- Kunlabore kun alia kuracejo la Pekina Hospitalo faris aŭtotransplantadon de medolo per fluidaĵ-kulturado eksterkorpa kaj sukcesis en kuracado de malfrua limfa tumorino de iu laboristino.

Qingqing kaj ĝiaj ĝemeloj



Kuraci leŭkemion, limfan tumoron kaj aliajn malsanojn per transplantado de medolo aperis nur antaŭ dek jaroj kaj oni faris transplantadon ĉefe el alia korpo. Tiu metodo sukcesis nur ĉ. 10 fojojn en la mondo.

● Medicinistoj de Dongzhimen-hospitalo sub la Pekina Ĉin-medicina Instituto fondis en Germanio la unuan perfektan ĉin-medicinan hospitalon kun ĉiuj medicinaj fakoj. Ili kuracos pacientojn en la hospitalo, aplikante tradiciajn metodojn, kaj faros perfektan medicinan aktivadon.

SPORTO

● La Ĉina Olimpika Komitato deklaris la 8-an de marto, ke Ĉinio decidis fari peticion pri okazigo de la Olimpikoj en 2000 en Pekino.

● Vespere de la 7-a de marto la juĝkomitato de Kodak-pokalo publikigis la nomojn de la 10 eminentaj ĉinaj sportistoj de 1990. Ili estas Zhou Lingmei (biciklado), Deng Yaping (tabloteniso), Gao Min (plonĝo), Shen Jianqiang (naĝo), Lin Li (naĝo), Li Jing (gimnastiko), Xing Fen (halterlevo), Xie Jun (ŝako), Zhuang Yong (naĝo) kaj Liu Huajin (atletiko).

ARTO

● Jaspa pagodo 4.3 metrojn alta estis farita antaŭ nelonge en Jadaĵ-fabrika de Zhenping, Henan-provinco, en la meza baseno de la Flava Rivero.

La pagodo estas skulptita el kanada jaspo. Ĝi, 13-etaĝa, havas diametron de maksimume 80 cm. Ĝi estas inkrustita per 112 versimilaj statuoj de budhoj, feinoj, drakoj kaj leonoj.

TURISMO

● La urbomuro de Xi'an, la plej granda kaj bone konservita mezepoka defendejo, nun majeste staras kiel

en Ming-dinastio (1368-1644) post 8-jara riparado. Kun perimetro de 13.7 kilometroj ĝi kovras areon de 11.5 kvadrataj kilometroj. Ĉiuj difektitaj kaj falintaj partoj, kavoj, parapetoj, kreneloj, defluiloj kaj surmurigaj vojoj estas bone riparitaj. Tie konstruiĝis 13 turoj en stilo de Ming-dinastio kaj poste konstruiĝos 4 angul-turoj, 20 defend-turoj, embrazura turo sur la suda pordego, ĉefturo sur la norda pordego kaj surmuriga vojo ĉe la orienta pordego, tiel ke la urbomuro fariĝos kompleta tuto kaj bela turisma loko en verdaĵo.

● La unua mara turisma centro de Ĉinio — Surmara Mondo en Shekou de la Speciala Distrikto Shenzhen — kun luksa franca turisma ŝipo dekmil-tonela kiel ĉefa parto prezentas multajn novajn turismajn distraĵojn, kiaj "Foiro de Ĝenroj de Ĉinio" kaj "Ĉinaj Urboj", unuigantaj arton, komercon, turismon, kulturon kaj frandon, per kio ĝi allogas multajn turistojn.

● La Forstokultura Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko faris lokon kun areo de 200 000 kvadrataj kilometroj sur Qiangtang-altebenajo la plej granda altebenaja menaĝerio. Qiangtang-altebenajo situas inter la montaroj Kunlun, Tanggula kaj Gangdise. Ĝi, tre maldense loĝata, estas nomata dezerta loko. Kun aparta ekologia sistemo ĝi estas vivloko de kuriozaj sovaĝaj bestoj de Ĉinio, kiaj sovaĝaj poefagoj, tibetaj kiangoj, tibetaj antilopoj, ovioj, ursoj, lupoj, neĝleopardoj, linkoj, tibetaj neĝkokoj kaj aliaj mamuloj kaj birdoj.

● La ĉina urbo Heihe de Heilongjiang-provinco kaj la sovetia urbo Blagoveshchensk komencis unutagan ekskurson inter si en septembro 1988. Ĝis nun la du urboj interŝanĝis 1 300 grupojn el 53 000 turistoj. La ekskurso akcelis la ekonomian kaj teknikan kunlaboron kaj landliman komercadon inter la du urboj.

Deviga arboplantado en Pekino



Legismo, artifekismo kaj potencismo

de HOU JUELIANG

FILOZOFO Xunzi asertis, ke posteuloj devas superi antaŭulojn, kaj kuraĝigis lernantojn superi instruistojn. Vere, liaj du lernantoj superis lin en iuj flankoj: Unu estis Han Fei, eminenta reprezentanto de la legalizisma skolo, kaj la alia estis Li Si, ĉefministro de Qin-regno, kiu asistis al la Unua Imperiestro de Qin-dinastio pri unuigo de la longtempe feŭda kaj displitita Ĉinio.

Han Fei naskiĝis en ĉ. 280 a.K. kaj mortis en 233 a.K. Li origine estis aristokrato de Han-regno. Li skribis leteron al la monarko de Han-regno, ke ĉi tiu faru politikan reformadon por prosperigi kaj potencigi la regnon. La monarko ne akceptis lian opinion, kio multe malesperigis lin. De tiam li absorbiĝis en verkado kaj studis la teorion de la legalizisma skolo. La libro *Han Fei* entenas liajn 55 artikolojn. Tiam papero ne estis inventita, kaj oni skribis sur bambuaj slipoj. Tial verki estis malfacile, kaj ankaŭ diskonigo de verkoj estis sufiĉe malfacila. Tamen verkoj de Han Fei cirkulis de Han-regno al Qin-regno. Leginte liajn artikolojn, la reĝo de Qin-regno admiris: "Kiel bone la aŭtoro verkis! Se mi havos ŝancon intervidiĝi kun li, mi certe vojaĝos kune kun li kaj ne bedaŭros en la tuta vivo." Li soifis talentulojn. Informiĝinte de Li Si, ke Han Fei estas Han-regnano, li ekspedis armeon al Han-regno kaj venigis Han Fei al

Qin-regno. La reĝo tre ĝojis, sed Li Si jaluzis pri la talento de Han Fei, timante, ke li prenos lian postenon. Kaj li faris kalumnion antaŭ la reĝo, ke kiel Han-regnano Han Fei ne povas esti lojala al Qin-regno. La suspektema reĝo kredis la kalumnion de Li Si, malintimiĝis al Han Fei kaj fine ĵetis lin en karceron. Kaptante la okazon, Li Si sendis doni al Han Fei venenon. Ĉi tiu petis aŭdiencon de la reĝo, sed malsukcesis. Poste, kiam la reĝo konsciiĝis pri sia eraro kaj volis liberigi lin, ĉi tiu jam sin mortigis per la veneno. Pri tio historiisto Sima Qian skribis: "Mi malĝojas nur pro Han Fei. Lia artikolo 'Malfacila Konsilado' estas tiel brila, tamen li mem ne eskapis de katastrofo."

La de Sima Qian laŭdata artikolo "Malfacila Konsilado" per multe da faktoj montras, ke estas malfacile koni la koron de monarkoj. Konsilantoj devas esti ege singardemaj. Se iliaj konsiloj ne konformas al la deziro de la monarko, tio povas venigi al ili danĝeron kaj eĉ morton.

Han Fei diris, ke laŭ la aspekto de monarko oni ne povas scii, kion li pensas. La konsiloj de konsilantoj malofte trafas lian deziron. Monarko, kiu ĉasas famon, opinios vin malnobla, se vi persvados lin, ke li ĉasu profiton. Monarko, kiu avidas grandan profiton, opinios vin malsaĝa, se vi admonos lin, ke li ĉasu famon, iafaje mo-

narko ĉasas ŝajne famon sed fakte profiton, do estas malfacile por vi doni al li konsilon. Se vi admonos lin, ke li ĉasu famon, li montros al vi ŝajne intimecon sed kaŝe malintimiĝos kun vi; se vi admonos lin, ke li ĉasu profiton, li kaŝe akceptos vian opinion, sed publike forlasos vin. El ĉio ĉi Han Fei konkludis: Estas tre malfacile doni konsilojn al monarkoj. La malfacilo kuŝas ne en la manko de argumentoj ĉe vi, sed en la konado de la penso de monarkoj. Han Fei ekzemplis, ke en la pasinteco la monarko de Zheng-regno intencis aneksi Hu-regnon. Li unue edzinigis sian filinon al la monarko de Hu-regno kaj poste kunvokis siajn korteganojn kaj demandis ilin: "Mi intencas fari militon. Diru al mi, kiu regno estas invadenda!" Kortegano Guan Qisi respondis: "Hu-regno." La monarko eksplodis de kolerego: "Hu-regno estas nia frata najbaro. Sed vi proponis invadi ĝin! Kian fiintencon vi havas?" La monarko tuj mortigis Guan Qisi. Informiĝinte pri tio, la monarko de Hu-regno kredis, ke Zheng-regno estas bona amiko kaj malstreĉis sian defendon. La monarko de Zheng-regno do faris surprizan atakon kaj tuj okupis Hu-regnon. Guan Qisi sciis nur, ke la monarko intencas aneksi Hu-regnon, sed neniam ke li intencas fari ŝajnigon antaŭ la agreso. Tial li fariĝis viktimo de la politika kamuflado.

Han Fei menciis ankaŭ alian ekzemplon: Estis bela junulo no-

mata Mi Zixia, favorato de la monarko de Wei-regno. Foje la patrino de Mi Zixia malsaniĝis. Informiĝinte pri tio, Mi Zixia, kiu servis en la kortego, volis tuj hejmeniri. Li aŭdace uzis la kaleson de la monarko en lia nomo, pro kio li devus esti kondamnita al kruro-forhako. Sed kiam la monarko sciigis pri lia konduto, li diris: “Mi Zixia estas bonega filo. Por viziti la malsanan patrinon, li eĉ forgesis, ke li agis kontraŭleĝe.” Alifoje Mi Zixia akompanis la monarkon al fruktoĝardeno por gustumi freŝajn persikojn. Li plukis tre dolĉan persikon kaj ekmanĝis. Formanĝinte duonon, li subite konsciis, ke tiel bongustan persikon devas ĝui la monarko. Li do prezentis al la monarko la restan duonon de la persiko. Tio estis malĝentila kaj ofenda kontraŭ la monarko. Tamen la monarko ĝoje diris: “Kiel forte min amas Mi Zixia, ke li eĉ ne volas sola manĝi dolĉan persikon.” Sed la feliĉo de Mi Zixia daŭris ne longe. Kiam lia beleco velkis, la monarko subite kulpigis lin kolere: “Kial vi ŝtele uzis mian kaleson? Kial vi donis al

mi la restaĵon de via persiko?” La amo de Mi Zixia al la monarko ne ŝanĝiĝis, sed tiu de la monarko al Mi Zixia ŝanĝiĝis. En la fino de la artikolo “Malfacila Konsilado” Han Fei priskribis la temperamenton de monarkoj kiel tiun de drako. Ordinare, drako estas obeema, kaj vi povas rajdi sur ĝia dorso aŭ amuziĝi incitante ĝin. Tamen vi neniam tuŝu la inversajn skvamojn sub ĝia gorgo. Se vi tuŝos, la drako koleregos kaj vin englutos. Ankaŭ monarkoj havas inversajn skvamojn — nedireblajn pensojn kaj kaŝitajn fiagojn — kiuj estas same netuŝeblaj. “Malfacila Konsilado” analizis la internan mondon de monarkoj kaj manifestis la akran vidon de Han Fei.

Filozofie Han Fei estis influita de Laozi kaj Xunzi. Pri tao Laozi diris, ke ĝi estas absoluta koncepto, antaŭas al materio kaj naskas ĉiujn estaĵojn. Kaj tiel li inversigis la rilaton inter materio kaj ideologio. Ankaŭ Han Fei parolis pri tao, sed malsame ol Laozi. Li opiniis, ke tao estas ĝenerala leĝo de la naturo kaj ĉiuj aferoj disvolvi-

ĝas kaj ŝanĝiĝas laŭ ĝi. Kaj tiel li ĝustigis la rilaton inter materio kaj ideologio: ne tao naskas ĉiujn estaĵojn, sed ĉiuj estaĵoj naskas taon. Li diris, ke ĉiu afero havas sian leĝon. Sanktuloj devas observi leĝojn de ĉiuj aferoj kaj utiligi ilin por servi ĝin al nia transformado de la socio kaj naturo. Utiligante la objektivajn leĝojn, li kiel Xunzi alte taksis la subjektivan iniciativon de homoj.

Ĝuste pro tio li multe pledis por socia reformado. Li opiniis, ke la homa socio senĉese antaŭeniras kaj evoluas, kaj la metodo de regado ne devas resti senŝanĝa, sed ŝanĝiĝi laŭ la tempo. Oni devas alpreni malsamajn metodojn de regado en malsamaj historiaj stadioj kaj nuligi eksmodajn regmetodojn de praaj reĝoj. Li rakontis jenan interesan historion: Zheng-regnano volis aĉeti ŝuojn kaj mezuris sian piedon. Atinginte bazaron, li rimarkis, ke li forgesis kunporti la mezuron. Antaŭ ŝustando li diris: “Mi forgesis la mezuron.” Kaj li sin returnis por preni ĝin. Kiam li revenis kun la mezuro al la bazaro, la vendistoj



KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj au/ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Serĉas filatelaĵojn el la tuta mondo pri la temoj ŝipoj, lumturoj, moroj, pontoj ktp uzitaj aŭ neuzitaj. Mi respondas al ĉiuj skribantoj. Adr.: Maufred Scholz, Georg-Weerth-Str. 8, D-0-6900 Jena, Germanio.

Senkostaj anoncetoj por korespondemuloj!

Jenaj aŭstriaĵaj gazetoj presas senkoste vian korespondpeton:

a) Kurier-Ombudsman, Seidengasse 11, A-1072 Wien;

b) Bazar, Postfach 1041, A-1041 Wien;

c) Fundgrube, Postfach 166, A-1121 Wien.

Necesas jenaj indikoj:

Lando, nomo (ina aŭ vira), adreso, aĝo, korespondlingvo(j), hobiaj.

* 16-j. junulino dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Živile Stankevičiute, Lithuania Litovio, Traku Raj, 234220 Vievis, Žveju 40, Sovetunio.

* 31-j. instruisto volas korespondi tm. Akram Roongha, 72/7 M-Gerianwala, Outside Pak Gate, Multan-Pakistan.

* Erika Šereikaite, 20-j. fraŭlino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri vojaĝoj kaj literaturo. Adr.: Kosmonautu 8-22, 235000 Jonava, Litovio, USSR.

* Sonata Aidukaite, 20-j. fraŭlino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri vegetarismo, biciklado kaj literaturo. Adr.: Kosmonautu 46-26, 235000 Jonava, Litovio, USSR.

* Dite Aleks, 15-j. junulo, dez. kor. kun samaĝaj kaj saminteresaj junulinoj, interesiĝas pri komputiloj, fotado, historio, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, ekonomio kaj muziko. Adr.: Krasnoturinskaja, d 15, kv 15, Volčansk-624488, de Sverdlovskaja reg., USSR.

jam disiĝis. Oni demandis lin: "Kial vi ne provus per viaj piedoj?" Li respondis: "Mi fidas la mezuron pli ol miajn piedojn." La ŝu-aĉetanto estis stulta. Kiam la situacio ŝanĝiĝis, li ankoraŭ agis dogmisme, ne sciante akomodigemon, kaj rezulte li ne atingis sian celon aĉeti ŝuojn. Ankaŭ la dogmismaj regantoj estas same ridindaj kiel la ŝu-aĉetanto. Ili perdis memfidon, tenas en sia kapo nur politikojn de praaĝ reĝoj, sed ne aktualizaĵojn de la socio. Antaŭ novaj kondiĉoj kaj problemoj ili ne povas prezenti novajn solvojn, ne sciante, kion fari, kaj ne povas atingi la celon bone regi sian regnon.

Han Fei vivis en la 3-a jc. a.K., en la fino de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), kaj baldaŭ finiĝis la separatista situacio kaj Ĉinio estis iranta al unuiĝo. Novaj regantoj bezonis teorion kaj doktrinon por starigi kaj fortigi centralizismon. Han Fei ĝustatempe elmetis feŭdan teorion de regado, akomodigantan al la bezono de la historia disvolvigo.

Han Fei akceptis la teorion de Xunzi pri malbona naturo. Li opiniis, ke la naturo de la homo estas egoisma. Homoj konsideras siajn proprajn interesojn farante iun ajn aferon. Ekz., s-ro Wang Liang ŝatas bonan ĉevalon por veturigi sian ĉaron; kuracisto suĉas sangon el ies vundo, celante nenion alian ol pli da pago; lignajisto faras ĉarojn por riĉuloj, celante profiti el tio; ĉerkofaranto esperas fruan morton de homoj, dezirante pli da mono. Ĉar la homa naturo estas tia, ne ekzistas amo inter la homoj. Li opiniis, ke por transformi la homan naturon, oni ne devas dependi de la morala predikado de konfuceanismo, sed forĵeti humanan regadon kaj pledi por leĝa regado. Li ekzemplis, ke estis iu sentaŭgulo, kiu faris kanajlaĵojn. Li ne korektis siajn erarojn, kvankam liaj gepatroj kolere riproĉis lin. Li ne kortuŝiĝis de la admonado de najbaroj nek de la pacienca edukado de instruistoj. Sed kiam loka instanco lin arestis kaj punis

lin laŭ la leĝo, li sentis timon kaj komencis ŝanĝi sian konduton. El tio Han Fei konkludis: Estas neeble bonigi la infanojn nur per sincera admono de la gepatroj, najbaroj kaj instruistoj, sed la rebonigon povas sukcesigi la justicoficistoj. Rilate la popolon, Han Fei proponis doni severan punon kaj grandan premion, eduki per la leĝo kaj preni ŝtatoficistojn kiel instruistojn. La registaro devas ellabori unuecan leĝon kaj devigi la popolon observi ĝin, alie la socio dronos en haoso.

Han Fei opiniis, ke la monarko ellaboras leĝojn, ŝtatoficistoj ilin praktikas kaj la popolo ilin observas por ordigi la socion. Tamen ne venos vera paco, se la monarko nur regas la popolon. Samtempe li devas alpreni necesajn rimedojn por regi diversnivelajn ŝtatoficistojn, ekz. ekzameni ilin kaj nomumi, eksigi, premii kaj puni ilin pro ilia bona aŭ malbona ago. Tiuj rimedoj kontraŭ ŝtatoficistoj ja estis artifikismo de Han Fei. Samtempe kun emfazo de leĝismo kaj artifikismo, Han Fei akcentis ankaŭ la rolon de potencismo. Li avertis la monarkon, ke li bone tenu siajn regpotencon kaj pozicion kaj ne perdu ilin. Se li perdus la regpotencon, li ne havus eĉ la povon regi tri homojn. Kombininte leĝismon, artifikismon kaj potencismon, la monarko povas bone regi la regnon, alie, tumulto okazos tra la lando.

La teorio de Han Fei pri leĝa regado estis laŭdata de la reĝo de Qin-regno. Li fondis la centralizisman Qin-dinastion per tiu teorio kaj faris kruelan regadon al la popolo, kaj la dinastio daŭris nur 14 jarojn. La postaj regantoj estis iom pli saĝaj. Ili aplikis samtempe leĝan regadon de legalizismo kaj moralan edifon de konfuceanismo al la popolo. Ili ŝajnigis sin humanaj, edifemaj kaj homamaj, fakte ili ne malstreĉis sian ekspluatadon kaj subpremadon al la popolo. Tiel la teorio de Han Fei estis sukcese aplikata kaj ludis sian rolon en la feŭda regado dum miloj da jaroj. ■

KOMPARO DE ĈINAJ IDEOGRAFIAĴOJ KUN LA OKCIDENTA FONETIKA SKRIBO

La fonetika skribo, reprezentata de la hindeŭropa familio, estas speco de sonaj signoj formitaj surbaze de certaj reguloj. La ideografiaĵoj, reprezentataj de la hana lingvo de Ĉinio, ne estas kompilitaj el certaj signoj, sed kreitaj laŭ imito kaj imago al la fenomenaj ekzistaĵoj. Iliaj strekoj formis kvadratan strukturon. La hanaj ideografiaĵoj ja prezentas ideon surbaze de figuroj. Ili esprimas ideon per pluraj manieroj kaj estas strukturo konsistanta el la ekstera formo kaj la interna ideo. Ili estas efikaj por esprimi la ideon kaj sugesti la signifon. La ideografiaĵoj memorigas al la legantoj pri la objektiva mondo kaj havigas al ili riĉan imagon.

La kvarangulaj hanaj ideogramoj ne estas bildoj nek fonetikaj transskriboj, tamen montras kaj la sonon kaj la signifon.

La hanaj ideogramoj profunde influis la ĉinojn en formiĝo de la kulturaj karakterizoj, kiaj alta takso de la realo, spirito, harmonio, ekvilibro kaj imaga pensado. Ili ludis gravan rolon en la formiĝo de la unueco kaj kontinueco de Ĉinio. Kvankam multe ŝanĝiĝis la hanaj ideogramoj, tamen ili estas ĉiam viglaj. Ili ne perdis sian unuecon malgraŭ komplekseco de la dialektoj. Tia unueco sendube ludis gravan rolon por koheriĝo de la ĉina popolo, politika unueco, kultura heredo, nacia interasimiliĝo kaj formiĝo de la komunaj moraloj de la ĉina nacio. Tia unueco kaj heredo kaŭzis al la ĉinoj komunan percepton kaj fierecon al sia nacia kulturo. Kompreneble ankaŭ la okcidentaj fonetikaj skriboj ludas gravan rolon en la historio por formi kulturajn karakterizojn de la okcidentanoj, kia logika kaj abstrakta pensado.

NACIAJ MOROJ PRI RESPEKTO AL LA MALJUNULOJ

La ĉina nacio havas noblan moron respekti maljunulojn.

Taj-oj tre respektas maljunulojn. La maljunuloj mem decidas, kun kiu filo aŭ filino ili vivos. La senfil(in)aj maljunuloj ĝenerale vivas kun sia parenco aŭ amiko, kiu traktas ilin kiel siajn proprajn gepatrojn dum la tuta vivo. Iuj eĉ rekte nomas ilin gepatroj.

Ĉe la manĝo ĝuang-oj ĉiam prezentas bongustaĵojn al la maljunuloj. Ili cedas sidlokojn al maljunuloj. Renkontante maljunulojn surstrate, ĝejnuloj salutas ilin kiel "onklon" aŭ "onklinon", sed neniam rekte vokas ilin je la nomo.

Ĉe la fianĉiĝo de gaŭŝan-oj kaj jaŭ-oj, la fianĉinoj devas donaci al la familianoj de sia fianĉo ŝuojn. Sur la plandumoj de la ŝuoj, donacotaj al la bogevojoj, la fianĉinoj brodas la Grandan Ursinon simbolantan eternan sanon kaj longan vivon. Sur tiuj donacotaj al la

bogepatroj, ili brodas pinon, emblemon de sano kaj forto.

La mongoloj ŝatas stufitan ŝafaĵon kun osto. Ili tranĉas ŝafaĵon per mongola tranĉilo kaj prezentas la delikatan ŝaffemuraĵon al maljunuloj, dum la junuloj, infanoj kaj virinoj prenas ripaĵon, kruraĵon kaj brustaĵon.

La maljunaj hani-oj pasigas la lastajn jarojn ĉe sia unua aŭ lasta filo. La filoj kun ĝojo vivtenas la gepatrojn. Kiam la gefiloj, kiuj aliloke vivas, preparis bongustaĵojn, ili certe invitas la gepatrojn al si manĝi aŭ persone portas la frandaĵon al siaj gepatroj.

KIAM LEVIĜIS HIMALAJO?

Himalajo, meznombro 6 000 metrojn alta super la marnivelo, estas la plej alta montaro en la mondo. Pro tio ĝi estas nomata "tegmento de la mondo", tamen malmultaj homoj scias, kiam ĝi leviĝis.

Lastatempe, esplorista trupo de la Ĉina Akademio de Sciencoj sur la norda montodeklivo de Himalajo trovis, ke ĉiuj trovitaj praaj bestoj kaj vegetaĵoj estas maraj, kiuj vivis en la tempo inter ordovicio antaŭ 500 milionoj da jaroj kaj frua eoceno de terciaro antaŭ 40 000 000 jaroj. Ili estas kompleta mara sedimenta roko. Tio montras, ke antaŭ 40 000 000 jaroj tie estis vasta maro.

La unuafoja montoformiĝa movado de la Tibeta Altebenaĵo okazis en eoceno. En la meza periodo de mioceno, t.e. antaŭ 12 000 000 jaroj, la nuna Tibeta Altebenaĵo estis alta norde kaj malalta sude kun meznombra alto de 1 000 metroj. Antaŭ tio, la loko transformiĝis malrapide, kaj pro la longdaŭra ebeniĝo la interna loko estis pli ebena. En ĝia nordo la plej alta montpinto estis malpli ol 2 000 metrojn alta super la marnivelo. Tiam ne vidiĝis Himalajo.

En la meza periodo de mioceno, drasta movado de Himalajo faris la ebenan lokon kompleksa, aperis faŭltaj basenoj kaj faŭltaj montoj, pli forte ondiĝis la tersurfaco, tiel ke formiĝis bona stratumo de mioceno. De tiam ĝis la lasta periodo de terciaro antaŭ 2 000 000 jaroj, la altebenaĵo malrapide leviĝis en egala rapideco, en vasta loko formiĝis la stratumo de plioceno, tiam la loko altis ĉ. 1 500 metrojn kaj superis la ĉirkaŭajn montojn. La ebena areo estis denove detruita, daŭre leviĝis la loko kaj formiĝis la Montaro Himalajo.

De post la kvaternaro (antaŭ ĉ. 2 000 000 jaroj), pro la pli kaj pli forta premado de la hinda terbloko al la eŭrop-azia kontinento, iom post iom leviĝis la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, poste ĝi leviĝis pli multe. Antaŭ 1 000 000 jaroj la altebenaĵo altis ĉ. 3 000 metrojn, dum Himalajo superis 5 000 metrojn. De post la altebenaĵo periodo de holoceno (antaŭ 10 000 jaroj) Himalajo leviĝis ĉ. 500 metrojn. Nun, la hinda terbloko daŭre moviĝas norden kaj senĉese premas la eŭrop-azian terblokon, tiel ke daŭre malrapide leviĝas Himalajo.

Kiu estas ŝia patrino?

Al la elementa lernejo de vilaĝo venis nova instruistino. Ŝi estis juna kaj silentema, malofte parolis pri sia familio kun siaj kamaradoj. En dimanĉoj kaj festotagoj ŝi ofte iris en la gubernian urbon aŭ kamparon, sed ĉiufoje ŝi diris al siaj kamaradoj, ke ŝi iras viziti sian patrinon. La kamaradoj miris: Kie estas ŝia patrino?

Ŝi nomiĝas Zhang Fengmei. Kiam ŝi estis unujara, ŝiaj gepatroj eksedziĝis. Ŝia patro ne reedziĝis timante, ke duonpatrino malbone traktos ŝin. La patro spertis multajn malfacilojn por vivteni ŝin. Kiam ŝi lernis en mezlernejo, li estis trafita de kancero. Antaŭ la morto li diris al la filino: "Vi perdos la patron, sed vi neniel ĉesu lerni."

Tri tagojn post la forpaso de la patro, onklino forportis ŝin. Pasis multe da tagoj, sed neniu el la familio de la onklino menciis ŝian lernadon. Ŝi demandis tion al la onklino, kaj tiu ĉi respondis: "Vi ne bezonas viziti lernejon. Mi vivtenos vin. Estonte, mi havigos al vi okupon kaj edzinigos vin al bona viro."

Ŝi neniel povis forgesi la lastan vorton de sia patro. Ŝi volis daŭrigi

la lernadon. Ŝi reiris al sia hejmo.

Fengmei forestis de leciono jam unu semajnon. La ĉefinstruistino maltrankviligis: "Ĉu io okazis al Fengmei?" En dimanĉo ŝi venis al la hejmo de Fengmei. Kiam ŝi vidis la ruĝajn ŝvelajn okulojn de Fengmei kaj la funebnan rubandon sur ŝia brako, ŝi komprenis, ke malfeliĉo falis sur ŝin. Ŝi firme brakumis sian bonan lernantinon.

En la sekvanta tago la instruistino raportis la malfeliĉon de Fengmei al la lernejestro. La lernejestro konsentis, ke Fengmei lernos senpage.

De tiam Fengmei ofte trovis en sia librosako monon kaj necesajojn por lernado, sed ne sciis, kiuj donacis al ŝi.

Dank' al la helpo de la instruistino kaj kamaradoj, Fengmei sukcesis trapasi la ekzamenon por eniri normalan lernejon. Sed kiam Fengmei ricevis la sciigon pri akcepto de la lernejo, ŝi falis en malĝojon: ŝi ne havas monon por kotizi kaj sin vivteni. Ŝi ploris.

Najbara onklino konsolis ŝin: "Ne ĉagreniĝu. Mi vendos mian porkon kaj ni havos monon." Sed kontraŭ unu porko ŝi povis akiri

nur 200 juanojn, kiuj ne sufiĉis por la bezono.

La ĉefinstruistino informigis pri la afero kaj tuj raportis ĝin al la lernejestro. Li alvokis la lernejanojn al monhelpo kaj petis helpon de la gubernia civila administracio. La administracio promesis pagi kotizon por Fengmei, kaj la mono kolektita en la lernejo estis uzata por ŝin vivteni. La estrino de la civila administracio akceptis Fengmei kaj kuraĝigis ŝin al bona lernado.

Fengmei estis irona al la normala lernejo. Ŝi firme premis la



manon al la ĉefinstruistino, najbara onklino kaj estrino de la civila administracio, kaj diris en emocio: "En la infaneco mi perdis la patrinon, sed nun mi havas multajn karajn patrinojn..." Larmoj brilis en la okuloj de ĉiuj ĉeestantoj. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj au/ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Karolina Roszak, 15-j. lernantino, dez. kor tm., interesiĝas pri aŭtoj kaj motoroj. Adr.: Zych-

lin 13/4, 63-324 Kuozkow, Woj. Kalisz, Pollando.

* Soldatenkov Sergeo, 20-j. komencanto, dez. kor. tm. pri sporto, medicino, vojaĝoj, interŝanĝi pm., bk., librojn. Adr.: Vostochnaja 49-3, Krasnojarsk-39, SU-660039, USSR.

* Sylvia Siebert, 22-j. studentino, dez. kor. Esperante, angle kaj ruse, interesiĝas pri legendoj, mitoj kaj fabeloj el Azio, precipe Tibeto.

Adr.: Gartenstadt 139, Halberstadt, 3600, Germanio.

* Borĵonov Saŝa, 13-j. dez. kor. tm. kaj kolektas kalendarojn, glumarkojn, poŝtmarkojn. Adr.: Marksa, 19-21, Krasnojarsk, Siberio, 660097, USSR.

* Membroj (14-j.) de la Esperanto-grupo "Amikeco" dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Hungario, Magyarorszag, 3525 Miskolc, Dayka Gabor ut 4.

Ĉigong-terapio kontraŭ koronaria kormalsano

de GAO HUARONG kaj YU YAN

Koronaria kormalsano estas kaŭzita de anoksio kaj anemio de la miokardio pro aterosklerozo de la koronariaj arterioj, malvastiĝo aŭ obstrukco de la interna spaco de la vaskulo. Oni povas kuraci la malsanon per medikamentoj kaj ankaŭ per ĉigong-terapio. Ĉi-sube ni konigos kelkajn metodojn por kuraci ĝin per ĉigong-terapio.

I. Reguligo de la spirado

Prepara teniĝo:

Staru rekte kun la piedoj kunmetitaj, brakoj nature pendantaj malsupren kaj okuloj rigardantaj antaŭen.

Movoj:

Enspirante, staru rekte, streĉu la anuson, etendu la brakojn iom eksteren, turnu la atenton sur la malgrandajn fingrojn kaj malrapide levu la manplatojn, kvazaŭ vi elakvigus pilkon kaj tenus ĝin supren. Rektigu la krurojn, levu la kalkanojn kaj premu la plankon per la piedfingroj. Levu la manplatojn tiom alten, kiom la ŝultroj, kaj tenu ilin je la distanco sama kiel tiu inter la ŝultroj, kun la manplatoj supren kaj okuloj antaŭen.

Elspirante, tenu la brakojn iom internen kun la manplatoj malsupren kaj premu la kalkanojn al la planko. Malstreĉu la

ventron kaj anuson kaj malrapide kaŭriĝu kaj tenu la manplatojn, kvazaŭ vi premus surakvan pilkon malsupren.

Atentigoj:

1. Mallevu la manojn ĝis la alteco horizontale al la umbiliko, malstreĉu la kubutojn kaj tenu la brakojn duonarkaj.

2. Kaŭriĝante, tenu la genuojn kunmetitaj kaj fleksu ilin malpli antaŭen ol la piedpintoj kun la supra parto de la korpo rektigita.

Farante la ekzercadon, fiksivian atenton sur la pintoj de la malgrandaj, mezaj aŭ ringaj fingroj.

Faru la ekzercadon 4 fojojn, se vi estas grave malsana. Se vi estas ne grave malsana, faru iom multe, 8 fojojn maksimume.

Medicina ĉigong-o estas unu el la efikaj metodoj por preventi kaj kuraci koronarian kormalsanon. Farante ĝin, vi devas esti sobra al manĝado kaj humoro kaj daŭre preni medikamenton. Post la ekzercado, ĝenerale dirite, oni sentas sin komforte, fariĝas energioplena kaj bonhumora kaj retrovas bonan apetiton kaj dormon. Se vi ne sentas tion, vi do devas malpliigi la fojojn de la ekzercado.

(Daŭrigota)



Prepara teniĝo



Horizontala manplato-levo




Mallevo de la manoj

“Marfunda mondo” en Pekino

Teksto de WANG SONG
Fotoj de ZHAO CANG

Testudo-ĉefministro




Koraloj

NUN Pekino havas amuzan parkon, kia Disney-land. Kompreneble, ĝi estas multe malpli granda ol tiuj de Usono kaj Japanio. Krome, ĝi havas ne amindajn Donald Duck kaj Mickey Mouse, sed drakojn, totemon de la antikva Ĉinio. Tial la amuza parko havas la nomon Draka Palaco, ĉin-stila disneyland.

Sireno






La Draka Palaco en akvo

La Draka Palaco, antaŭ nelonge malfermita, situas en la antaŭurbo de Pekino, en la akvorezervejo proksime de la Dek Tri Imperiestraj Maŭzoleoj de Ming-dinastio. Sur la insuleto en la akvorezervejo staras ĝia surtera konstruaĵo pagodforma duetaĝa kun trioblaj aleroj. Ĝi surhavas bluan tegmenton kun flava rando. Oni povas ĝui la belan aspekton de la pagodo

brilanta en la suno kaj ĝian inversan ombron en akvo. Ĉinoj donis al la cifero "naŭ" signifon de infinito. Ekz. la Imperiestra Palaco de Pekino nombras 9 999 ĉambrojn. Ankaŭ la pagodforma konstruaĵo de la Draka Palaco estas tiel karakterizita. Ĝi estas naŭangula kaj havas trablojn, kolonojn kaj firstojn, ĉiuj po 9. Ĝi harmonias kun la Dek Tri Imperiestraj Maŭ-

Flutado por vizitantoj





La Drak-palaca Amuza Parko

Drakoreĝo



zoleoj de Ming-dinastio, kio donas al ĝi densan koloron de imperiestra palaco.

La ĉefa amuzejo de la palaco situas sub la akvorezervejo je 10-20 m. profunde. Drako, talismano en la okuloj de ĉinoj, estis simbolo de suvereneco de imperiestro en la feŭda socio de Ĉinio. Imperiestro estis rigardata kiel drakdevena. En Ĉinio cirkulas multe da mitoj pri drako. En la Draka Palaco oni kreis versimilan marfundon kun drako kiel ĉefheroo, prenante diversajn rimedojn, kiaj dekoracio, muldo, lumigo, akustiko, truko kaj robotoj. Ili rakontas al la vizitantoj belajn historiojn pri drakoj.

Trairinte la pordon de la palaco la vizitantoj povas malrapide veturi per turisma trameto kaj ĝui spektaklojn. Unue oni venas en la mirigan marfundan mondon. Ĉie kreskas kuriozaj herboj, floroj kaj algoj, inter kiuj dislokiĝas gigantaj rokoj kaj prosperas ĉarmaj koraloj. Naĝas inter ili fiŝoj kaj salikokoj. Tie estas aparte alloga droninta antikva ŝipo kun malfermita kajuto kiel granda faŭko, en kiu vidiĝas amaso da blankaj ostoj. Neniu scias, kiom longe la ŝipo jam dormas ĉi tie. Ŝajnas, ke ĝi rakontas al la vizitantoj pri sia malfeliĉo. Subite atakas la vizitantojn giganta ŝarko kun larĝe malfermita faŭko. Ekkrias la timigitaj vizitantoj pro la neatendita atako. Sed post atenta pririgardo oni trovas, ke ĝi estas me-

ĥanika ŝarko.

La palaco aspektas tute alia. Belaj sirenoj atenteme kombas al si la longajn harojn, konk-virinoj senĝene kantas, salikoko-soldatoj kaj krabo-oficiroj gardostaras antaŭ la pordego de la palaco kaj testudo-ĉefministro salutas ĉiujn pasantojn.

Meze de la halo sidas kun rideto maljuna drakoreĝo. Ĝi laŭte diras: "Mi estas drakoreĝo de la Orienta Maro." Kaj tuj poste ĝi ekridegas. La drakoreĝo havas naŭ filojn. Nun ili konkuras unu kun alia por kronprinceco. Ili pene montras sian kapablon. Iuj interbatalas por kapti globon en aero, aliaj ŝprucigas fajron, triaj akvon. La drakoreĝo rigardas kaj kontente ridegas. Sed kiam ĝi trovas, ke la inundo minacas la palacon, ĝi ege koleras. Ĝuste tiam abrupte malheliĝas lampoj kaj post momento rebrilas. Tiam oni trovas, ke la homa vizaĝo de la drakoreĝo fariĝis draka. La ŝanĝiĝema mieno de la drakoreĝo profunde impresas la vizitantojn.

Elirinte el la palaco, oni povas sin amuzi per ludo de pneŭmata pafilo aŭ veturi per jakto por ĝui la pejzaĝojn de la akvorezervejo. Se vin tio ne interesas, vi povas vin amuzi per motorboato. ■

Alloga “pendanta” domo

Teksto de LU CHUANBIAO

Fotoj de LI CHUNGENG

EN Ĉinio oni diras: “Domo stariĝas sur la tero.” Tamen ekzistas escepto. “Pendantaj” domoj dissemittaj en la okcidenta parto de Hunan-provinco ja estas ekzemplo.

En okcidenta Hunan estas multe da montoj kaj riveroj. Ĉiuj aktivadoj de tuĝja-*oj* kaj dung-*oj* loĝantaj tie generacio post generacio estas nedisigeblaj de montoj kaj riveroj. En la pasinta jaro, kiam mi faris turisman vojaĝon en okcidenta Hunan, mi vidis “pendantajn” domojn ĉe riveroj kaj sur montoj. Kvankam ili estas nur du- aŭ tri-etaĝaj, tamen ili, “pendantaj” super akvo kaj ĉe monttallo kvazaŭ aera kastelo, estis malfacile konstruitaj.

Antaŭe mi aŭdis pri domo kun “piedoj”, sed nur ĉi-foje mi eksciis, ke la “piedoj” fakte estas dikaj fostoj subtenantaj domon. La antaŭaj “piedoj” profunde fiksittaj en rivero kaj la alia flanko (murbazo) kune subtenas la “pendantan” domon; ĉe la monttallo du “piedoj” firme starantaj en malalta loko kaj la alia flanko (murbazo) kune subtenas la “pendantan” domon. Troviĝas ankaŭ malmulte da “pendantaj” domoj kun samlongaj fostoj kiel “piedoj” sur la tero. Laŭ loka kroniko, la plej fruaj “pendantaj” domoj estis starigitaj por eviti atakon de vipuroj kaj rabobestoj.


En sudokcidenta Hunan mi vizitis Huangtu-distrikton loĝatan de dung-*oj*. La distrikto havas 20 vilaĝojn kun pli ol 5 000 loĝantoj. Unue mi vizitis Xinzhai. Ĝi estas tipa dung-a vilaĝo, kiu situas sur montodeklivo. En la valo fluas rivereto, super kiu kuŝas granda ligna ponto — duonkovrita koridoro. Ĝi ŝirmas la pasantojn kontraŭ la suno kaj pluvo. Pro tio oni nomas ĝin “vent-pluva ponto”. Trans la ponto ĉe la vojo staras granda kiosko nomata “tambura turo”, kun

traboj kaj kolonoj havantaj gravuraĵojn kaj pentraĵojn. Tie la vilaĝanoj elektas oldan eminentulon, faras diskuton kaj societiĝon kaj prezentas operon. Elirinte el la “tambura turo”, mi eniris en la vilaĝon kaj vidis “pendantajn” lignajn domojn. En la vilaĝo troviĝas sume 30 tiaj domoj, duone novaj kaj duone malnovaj.

Allogis min baldaŭ finkonstruota “pendanta” domo bele iluminita proksime de la pordo de la vilaĝo. Kiam mi proksimiĝis al la domo, mezaĝa viro iris renkonte al mi kaj invitis min en la domon. Li estas Li Xianhui, ĝia mastro. Mi gratulis lin pro lia nova loĝejo. Li ĝoje diris: “Antaŭlonge mi deziris tian domon, sed mi ne havis sufiĉe da mono. En la lastaj jaroj mi kulturis orangarbojn laŭ kontrakto, ke ĉiumonate mi enspezis centojn da juanoj, kaj krome mi ankaŭ bredis porkojn, kokojn kaj anasojn, tial mi ne havis financan malfacilon en la dom-


Tambura turo





Enirejo de la vilaço





“Pendantaj” domoj en vilaĝo de dung-oj



Junuloj en “pendanta” domo
Foto de LIANG JING'AN



Gaja amuzado en festa soleno
Foto de YIN SHUMIN

konstruado.”

Li kondukis min supren al la dua etaĝo laŭ nestabila ligna ŝtuparo. Li diris, ke tiu etaĝo kovranta 60 kvadratajn metrojn estos septita en salonon, dormoĉambbron kaj kuirejon. En la mezo de la salono estas kavo servanta por hejtado en vintro. En iu muro estas niĉo kun areo de ĉ. 50 kvadrataj centimetroj, kiun la mastro uzos por kulti la prapatrojn aŭ preĝi por paco kaj riĉa rikolto. En la tria etaĝo estas ĉefe dormoĉambroj. La ter-etaĝo estos uzata por konservi grenon, oranĝojn, agrikulturilojn kaj aliajn objektojn. Tiam sur traboj jam pendis maizospikoj kaj kapsikoj por sekiĝo.

Mi demandis la mastron, kiam li transloĝiĝos en la novan domon. Li diris, ke post unu monato la domo estos finkonstruita. Laŭ moro de dung-oj la mastro devas peti iun elekti bonaŭguran tagon por transloĝiĝo.

“Bonaŭgura tago?”

“Jes. Por konstrui novan domon ni dung-oj havas multajn morojn.” Tre interese li konigis al mi, kiel dung-oj en bonaŭguraj tagoj elektas trabojn, hakas arbojn, komencas konstruadon, iluminas trabojn kaj krakigas fajraĵojn. Li diris, ke en la dua etaĝo loĝas novgeedzoj, en la tria etaĝo geavoj, gepatroj kaj infanoj. Kompreneble oni faris ankaŭ iujn ŝanĝojn, ekz. antaŭe staloj kaj necesejo estis en la teretaĝo kaj nun eksterdome, tial la domo estas pli pura; antaŭe en la dua etaĝo ne troviĝis kuirejo, nur en la salono estis forno, kio maloportunis la kuiradon, kaj nun la afero pliboniĝis.

Forlasinte Xinzhai-vilaĝon, mi sekvis ĉiĉeronon Huang trans valojn kaj montojn por viziti plej foran vilaĝon. Huang diris, ke tie koncentriĝas multe da malnovaj “pendantaj” domoj. Kiam mi tutkape ŝvitis de irado, Huang, kiu iris antaŭ mi, subite ekkriis: “Jen la vilaĝo!” Grimpinte sur la montpinton, mi rigardis malsupren kaj vidis miraklan mondon: Inter verdaj montoj konturiĝas grizaj tegmentoj unu apud alia etendiĝantaj de la monttalo ĝis la profundo de la valo kiel velkintaj larĝaj folioj. Sub ĉiu tegmento montriĝas du dikaj fostoj fiksitaj ĉe la monttalo. Fumo leviĝas super la tegmentojn kaj iafoje aŭdeblas kokeriko. Tio rememorigas pri fea lando en fabelo.

De la monttalo ĝis la valo ni vizitis kelkajn familiojn, el kiuj neniuj loĝas en nova domo. “Ĉu pli riĉas familioj ekster la monto ol tiuj ĉe la monto?” mi demandis iun familion.

“Ne tute. Vi ne scias, ke tiuj malnovaj domoj estas loĝejo de kelkaj generacioj kaj veraj “pendantaj” domoj. Ni rigardis ilin kiel plej valoran heredaĵon. Se nur ili ne estas difektitaj kaj ankoraŭ povas esti loĝataj, ni certe ne malkonstruos ilin.” La animstato de la mastro estas komprenebla, kaj oni eraras, se oni opinias, ke la loĝantoj emas konservi la malnovajn. Alie, kiel klarigi la neakordan fenomenon:



Kiosko por ripozo de pasantoj

Sur la tegmentoj de multaj malnovaj “pendantaj” domoj staras antenoj de televidiloj kaj en la domoj ne mankas novaj magnetofonoj, lavmaŝinoj kaj fridujoj. Antaŭe multaj montanoj dum la tuta vivo ne sciis, kiel aspektas la lokoj ekster la monto. Sed nun eĉ dekeljaraj knabinoj povas iri el siaj “pendantaj” domoj en la specialajn ekonomiajn distriktojn Xiamen kaj Shenzhen ĉe la maro por serĉi laboron.

Post du tagoj mi venis en lokon loĝatan de tuĝaĵoj en nordokcidenta Hunan. Tuĝaĵoj loĝas en samaj “pendantaj” domoj dissemataj sur montoj kaj ĉe riveroj. Sed la “pendantaj” domoj ĉe riveroj kaj ilia nedisigebla ĉirkaŭaĵo donas scenon malsaman ol tiuj sur montoj.

La urbeto Fenghuang ĉe Tuojiang-rivero ja estas ekzemplo. Tuojiang estas malgranda, tamen ĝi estas ĉefa vojo kondukanta al aliaj lokoj. Ĉe ĝia bordo oni konstruis kajon, tuj apud kiu staras vico da okulfrapaj “pendantaj” domoj. Malnova, mallarĝa kaj zigzaga strato pavimita per ŝtonplatoj kunligis riverbordon kun la urbeto kaj tio formis viglan komercan kvartalon. La makulitaj lignaj muroj, la malbrilaj




Ponto ŝirmanta kontraŭ vento kaj pluvo

Tradicia regalo per trinkaĵo el bak-pufigita rizo

pordoj kaj la ŝtonplata strato glatigita pro piedirado de kolportistoj montras sian longan historion. Tiam la “pendantaj” domoj ĉe la rivero estis pasloĝejo de komercistoj kaj pasaĝeroj de ŝipoj kaj ankaŭ loko, kie vivis prostituitinoj. Ĉiam, kiam noktiĝis, la lamplumo de la “pendantaj” domoj haltigis la ŝipojn sur Tuojiang-rivero, kaj la loko fariĝis nepra tranoktejo de homoj...

Tempo pasis kiel fluakvo. Hodiaŭ la urbeto multe disvolviĝis. Tiu komerca kvartalo jam ne estas tiel okulfrapa kaj tiuj “pendantaj” domoj viciĝantaj ĉe Tuojiang-rivero montras sin pli malnovaj kaj malmodernaj. Por junuloj mode vestitaj kaj zumantaj popkantojn la “pendantaj” domoj estas nerigardindaj, sed por maljunuloj ili estas neforlaseblaj kaj tiu nepriskribebla sento daŭre disvastiĝas kaj iom post iom infektas la turistojn, kiuj foje refoje venas malgraŭ longa vojaĝo por rigardi la “pendantaj” domojn. Iu sveda sciencisto ne nur mem venis plurfoje, sed ankaŭ organizis karavanon por viziti la lokon.

Eble iuj ne komprenas tion, ili aŭskultu la diron de tiea maljunulo: “Se vi venis nur unu fojon, se vi enuis pri monotona vivo en bruhava urbo, vi vidas, kiel allogaj estas tiuj malnovaj kaj malmodernaj ‘pendantaj’ domoj, kaj vidas la teron, sur kiu ili staras.” ■



Interesa prezentado

Fotoj de HAI FENG



Montrado de infanaj vestoj en akompano de kantado




Koncerto por vestomontrado

Aktoro de pekina opero (meze) kaj manekenoj



Montrado de diversaj vestoj





Montrado de vestoj por mezaĝuloj kaj maljunuloj



Printempe ĉi-jare okazis en Pekino koncerto por vestomontrado, kiun partoprenis ĉ. 100 manekenoj. Krom vestomontrado, oni ĝuis en ĝi ankaŭ prezentadon de kantistoj kaj dancistoj. Muziko, kanto kaj danco akompanis vestomontradon. En ĝi ne mankis ludo de ŝatata pekina opero. La bela prezentado, en kiu kombiniĝis la tradicia kaj moderna kulturoj de Ĉinio, multe interesis la spektatorojn.



La Jinan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko de Ĉinio

La politiko de reformo kaj pordomalfermo de Ĉinio donas vivecon al la nomita fabriko. Dank' al teknika reformo, ĝi disvolviĝis rapide kaj fariĝis unu el la tri ĉefaj entreprenoj de la ĉina ŝtala industrio. La pli-ol-30-jara fabriko havas 23 000 laboristojn. Kompletigita per avangardaj ekipaĵoj, ĝi havas la kapablon por maŝina prilaborado, transportado, scienca esplorado, projektado kaj inĝenieria konstruado. Ĉiujare ĝi produktas 760 000 tunojn da ŝtalo, 870 000 tunojn da fero, 600 000 tunojn da ŝtallaminataĵoj kaj 490 000 tunojn da koakso. Kaj krome, ĝi liveras ankaŭ simplan karbonan platon, karbon bitumon kaj aliajn 7 specojn da bonkvalitaj produktaĵoj.

La fabriko situas oriente de Jinan, Shandong-provinco. La loko, kun facila trafiko, havas kondiĉojn favorajn al investado. La Jinan-a Ĝenerala Ŝtala Fabriko de Ĉinio salutas siajn kolegojn de la mondo kaj bonvenigas ilin al investado por kuna ekspluato de la loko.

Adr.: Orienta antaŭurbo de Jinan, Shandong-provinco, Ĉinio
Tel.: 42896

Produktolinio por duonkontinua laminatilo enkondukita el Ĉeĥoslovakio



Produktolinio por kontinua muldilo enkondukita el Italio

Produktolinio de laminatilo por lameno 2 300

